UNESKO

# Kuriero

Julio-Septembro 2022



# KULTURO: tutmonda komuna bono

- Intervjuo kun **meksika** aktorino Yalitza Aparicio
- La videoflua amafero de ***Nollywood***
- **Islando:** Nova rigardo al malnova lingvo
- *Wijhat* vivigas artajn projektojn en **Bejruto**

NIA GASTO

**Eka Kurniawan,** indonezia verkisto: "Estus bonege vivi ĉirkaŭate de homoj, kiuj legas literaturon el la tuta mondo"

ISSN 2096-9082

unesco

EL POPOLA ĈINIO
www.espero.com.cn

## Abonu la presitan version

**1 jaro (4 numeroj) : 27€ 2 jaroj (8 numeroj) : 54€**

**Afranko: 9 eŭroj (1 numero)**

1 **Membro de UEA**, bonvolu pagi al nia konto ĉe UEA (celi-p)
2 **Se vi ne estas membro de UEA**, bonvolu pagi 66 svisajn frankojn jare aŭ 132 svisajn frankojn por du jaroj al jena konto:
PostFinance, Nomo: LIU JUN,
IBAN: CH98 0900 0000 3048 76172
Post via ĝirado, bonvolu informi min ĉe lamondo@163.com

## Abonu la bitversion

**Ĝi estas 100% SENPAGA**

**http://www.espero.com.cn/; http://esperanto.china.org.cn/; https://en.unesco.org/courier/subscribe**

## Sekvu la lastajn novaĵojn de *Kuriero*

**@unescocourier**

Facebook Twitter Instagram

## Legu kaj disvastigu

**Disvastigu kaj reklamu *UNESKO-Kurieron* laŭ Libera Aliro (*Open Access*), laŭ reguloj de UNESKO por publikaĵoj.**

**2022 • n-ro 3 • Eldonata ekde 1948**

*UNESKO-Kuriero* estas eldonata kvarfoje jare, de la Organizajo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO). Ĝi antaŭenigas la idealojn de UNESKO, diskonigante ideojn pri inter nacie gravaj temoj, konforme al sia mandato.

**Direktoro:** Matthieu Guével

**Ĉefredaktoro:** Agnès Bardon

**Asista redaktoro:** Katerina Markelova

**Sekcia redaktoro:** Chen Xiaorong

**REDAKTOROJ PRI LINGVOJ:**
**Angla:** Anuliina Savolainen, Linda Klaassen
**Ĉina:** Li Yihong kaj Ĉina Tradukejo kaj Eldonejo
**Franca:** Christine Herme, provlegado
**Hispana:** Laura Berdejo

**Cifereca redaktoro:** Mila Ibrahimova

**Fotoj kaj ilustraĵoj:** Danica Bijeljac

**Kunordigado pri traduko kaj enpaĝiga:** Marie-Thérèse Vidiani

**Administracia kaj redakcia asistanto:** Carolina Rollán Ortega

**Produktado kaj antaŭenigo:**
Ian Denison, Estro pri publikigado kaj varmarkada antaŭenigo de UNESKO
Eric Frogé, Ĉefa asistanto produktada

**Amaskomunikilaraj Rilatoj:** Laëtitia Kaci

**Fasonado:** Jacqueline Gensollen-Bloch

**Kovrila bildo:** © Agnieszka Ziemiszewska

**Internuloj:**
Tara Goodwin (Francio/Irlando)
Elise Poul (Francio)
Sébastien Procida (Francio)

**Kuneldonaj redaktoroj**

**Esperanto:** Chen Ji
**Kataluna:** Jean-Michel Armengol
**Korea:** Soon Mi Kim

**Informo kaj Kopirajtoj:**
*courier@unesco.org*
7, place de Fontenoy,
75352 Paris 07 SP, France

© UNESCO 2022

CC BY SA

Danke al la grandanima apogo de Ĉina Popola Respubliko

Periodaĵo, alirebla en Libera Aliro (Open Access) sub la licenco Attribution ShareAlike 3.0 IGO (CC BY SA3.0 IGO) (http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/igo/). Uzante la enhavon de ĉi tiu eldonaĵo, la uzantoj devas observi la priuzajn kondiĉojn de UNESKO-Deponejo de Libera Aliro (Open Access Repository) (http://en.unesco.org/ open-access/). La supra licenco koncernas ekskluzive la tekstojn. Por uzi la bildojn, oni devas peti permeson. La indikoj, uzitaj en tiu ĉi eldonaĵo, kaj la prezento de la donitaĵoj ne implicas esprimon de ia ajn opinio de fanke de iu ajn lando de UNESKO koncerne la leĝan staton de iu ajn lando, teritorio, urbo aŭsfero de ties regado aŭkoncerne markadon de landlimoj. La artikoloj esprimas la opiniojn de la aŭtoroj, ne nepre reprezentas la opiniojn de UNESKO, kiu ne respondecas pri ili.

**Malgarantio:** UNESKO ne garantias la konformon de la Esperanto-eldonaĵo al la originala numero en la ses oficialaj lingvoj de la Organizo.

**La bitversio haveblas senpage ĉe**
http://www.espero.com.cn/
http://esperanto.china.org.cn/
http://uea.org/revuoj/unesko_kuriero

**Supera organizo:** Ĉina Internacia Komunikada Grupo (CICG)
**Subtena organizo:**
Universala Esperanto-Asocio
**Eldono:** El Popola Ĉinio
**Prezidanto:** Chen Wenge
**Ĉefredaktoroj:** Wang Zhongyi, Zhao Jun
**Vicprezidantoj:** Wang Hanping, Wang Wei, Yu Wen
**Ĝenerala administristo:** Zhao Quanyong
**Aganta ĉefredaktoro:** Chen Ji
**Tradukantaro:** El Popola Ĉinio kaj UEA-Teamo
**Provlegantoj:** Chen Ji, Mao Zifu, Rafael Henrique Zerbetto, Rob Moerbeek kaj José Antonio del Barrio
Presita de Limigita Kompanio Yincheng-Beichuang en Pekino

**Adr:** P.O. Kesto 77, Beijing CN-100037, Ĉinio
**Tel:** +86-10-68996130
+86-10-68996590

**Retpoŝto:** lamondo@163.com

CN 10 - 1711/C ISSN 2096 - 9082
**Prezo:** 6.8 eŭroj

# Enhavo


4 **LARĜA ANGULO**

## Kulturo, tutmonda komuna bono

**1982-2022: Kulturaj politikoj en la koro de internacia debato** ....... **5**

**"Necesas plibonigi la integradon de la diverseco en kinematografio"** ........ **8**
Intervjuo kun Yalitza Aparicio

**La videoflua amafero de *Nollywood*** ........ **10**
Joey Akan

**Islando: Nova rigardo al malnova lingvo** ........ **12**
Kristján Guðjónsson

***Wijhat* vivigas artajn projektojn en Bejruto** ........ **15**
Noé Pignède

**En Suzhou, la nokto apartenas al kultura heredaĵo** ........ **18**
Wang Qin

20 **ZOMO**

**Nov-Delhio kun rideto, de Vineet Vohra** ........ **20**

30 **IDEOJ**

**NFT antaŭenigas la merkaton de cifereca arto** ........ **30**
Catherine Hickley

34 **NIA GASTO**

**"Estus bonege vivi ĉirkaŭate de homoj, kiuj legas literaturon el la tuta mondo"** ........ **34**
Intervjuo kun Eka Kurniawan

38 **PLI DETALE**

**Nuna stato: Diverseco de la kulturaj esprimoj** ........ **38**

UNESKO
Kuriero

## Ĉefartikolo

*MONDIACULT* 2022 – la Monda Konferenco pri Kulturaj Politikoj kaj Daŭripova Evoluigo estas parto de longdaŭra sindevigo de UNESKO kreskigi inkluzivan dialogon pri kulturo ĉe ĉiuj niveloj de la socio. Kiel en 1982, *MONDIACULT* denove okazos en Meksiko, kie la zumado de intelekta kaj kunlabora etoso kondukis al redifino de la nocio de kulturo. Ĉi tiu plilarĝigita kaj profundigita difino inkluzivas fundamentajn homajn rajtojn, sistem-valorojn, tradiciojn kaj kredojn.

Kvardek jaroj ne estas longa tempo, sed estas tempo sufiĉe longa por permesi al ni rerigardi malantaŭen al la publikaj agoj favore al kulturo katalizitaj de UNESKO dum la pasintaj jardekoj, kaj ankaŭ rigardi al la estonteco. La celo mem de *MONDIACULT* estas konstrui kulturajn politikojn adaptitajn al nia tempo, en konsidero de la grandegaj defioj, kiuj alfrontas nin – defioj, kiuj ne povas esti venkitaj sen renovigo de tutmonda solidareco.

Dum la mondo iom post iom resaniĝas el pandemio ne vidita dum pli ol jarcento, io sendube ŝanĝiĝis. La krizo malkaŝis la fortan interdependecon inter niaj socioj kaj elmontris kaj la fendojn kaj la fortojn en ĉiu sektoro. La kultura sektoro ankoraŭ suferas pro la efikoj de la san-krizo, kiu misproporcie influis regionojn kaj kreajn sektorojn. KOVIM-19 havis precipe severan efikon al virinoj kaj profundigis seksan malegalecon. La krizo elmontris kelkajn fendoliniojn, inkluzive de la ĉioma interrompo de turismo, la prirabado de arkeologiaj lokoj, la hazarda naturo de kultura dungado, la malfirmeco de la situacio de artistoj kaj de la komercaj modeloj de muzeoj kaj kulturaj institucioj, reta malinkluzivo kaj neegala aliro al kultura enhavo. Aliflanke, ĝi ankaŭ vigle elstarigis la efikon de kulturo sur ĉiu kampo de homa evoluo, de inkluzivigo ĝis edukado, de bonfarto ĝis rezistemo, de dialogo ĝis packonstruado.

Kongrue kun *MONDIACULT* 2022, ĉi tiu numero de UNESKO-*Kuriero* prezentas kelkajn ilustraĵojn pri la graveco de kulturo kiel portilo de ŝanĝo en niaj ĉiam pli interligitaj kaj multkulturaj socioj. La realeco de ĉi tiuj plurismaj socioj alvokas nin evoluigi publikajn politikojn adaptitajn al pluraj, diversaj kuntekstoj, repripensi la gvidajn fortojn de socia kunteniĝo kaj inkluziveco, de civitana partopreno kaj ekonomia, socia kaj media disvolvo per kulturo. Nia generacio havas la devon renovigi la socian kontrakton kaj akompani la estontajn generaciojn en pozitiva lernado pri kultura diverseco, en ĝia tuta komplekseco kaj ankaŭ en ĝia riĉigokapablo. Ĉi tiu generacio devas ankaŭ certigi la transdonon de scioj, historio kaj tradicioj per la konservado de heredaĵoj, kaj plifortigi solidarecon ĉe ĉiuj niveloj de niaj socioj.

> **“Kulturo estas nia plej potenca monda publika havaĵo**

Kulturo estas tio, kio difinas nin en spaco kaj tempo - niaj pasintaj kaj nunaj radikoj, niaj perspektivoj. Kulturo estas neelĉerpebla kaj renovigebla rimedo, kiu adaptiĝas al ŝanĝiĝantaj kuntekstoj kaj kiu parolas al homoj antaŭ ĉio per ilia kapablo imagi, krei kaj novigi. Kulturo estas nia plej potenca monda publika havaĵo. Laŭ la vortoj de Javier Pérez de Cuéllar, iama Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, kulturo havas rolon “kiel dezirinda celo en si mem, kiel donanto de signifo al nia ekzisto”. Hodiaŭ, pli ol iam ajn antaŭe, ni bezonas trovi signifon, ni bezonas universalecon, ni bezonas kulturon en ĝia tuta diverseco.

**Ernesto Ottone R.**
**Helpa Ĝenerala Direktoro pri Kulturo de UNESKO**

***-El la angla esperantigis Renato Corsetti (Italio)***



© Agnieszka Ziemiszewska por *UNESKO-Kuriero*

# Kulturo, tutmonda komuna bono



Dum septembro 2022, Meksiko denove gastigos la Mondan Konferencon pri Kulturaj Politikoj kaj Daŭripova Evoluigo (*MONDIACULT 2022*), kvardek jarojn post la unua konferenco en Meksikurbo, en 1982. La diskutoj dum lastaj kvardek jaroj estis aparte fruktodonaj kaj multe ŝanĝis la difinon de kulturo, malfermante vojojn por agnosko de vivaj heredaĵoj kaj la diverseco de kulturaj esprimoj. Krom la profunda efiko de la sankrizo sur la kultura sektoro, ĝi suferas pro novaj daŭraj danĝeroj, de efikoj pri klimatŝanĝiĝo sur heredaĵoj ĝis ŝanĝoj en statusoj de artistoj, kaj la lukto kontraŭ ŝakrado de kulturaĵoj. Tiuj temoj – kaj multaj aliaj – estos la ĉefaj temoj de la *MONDIACULT 2022*, kiu ankaŭ ebligos reaserti la lokon de kulturo kiel tutmonda publika kunhavaĵo. Ĉi tiu numero de la Kuriero esploras la ŝlosilan rolon de kulturo kiel rimedo por rezisto, inkluziveco kaj daŭripoveco.

→



KOVIM-19 kostis al tutmonda **kultura kaj kreiva** industrio ĉirkaŭ **750 miliardojn da dolaroj** nur en 2020

Fonto : *(Re)fari politikojn por kreivo,* UNESKO, 2022

La unua Monda Konferenco pri Kulturaj Politikoj kaj Daŭripova Evoluigo, okazinta en Meksikurbo en 1982, estis vera turnopunkto. Ĝi estigis la fundamentojn, por jardekoj, por la esenca koncepto de funkciaj ligoj inter kulturo kaj evoluigo de socioj. Kaj, kune kun la kresko de materiaj manifestadoj de kulturo, kreskis ilia interdependeco kun nemateriaj esprimoj.

Tio malfermis la vojon por protektado de ĉiuj esprimoj de kulturo, kiuj markas niajn vivmanierojn kaj transdonas sciojn kaj valorojn de unu generacio al la sekva.

Tiu vasta koncepto ebligis la Rekomendon de UNESKO pri Sekurigo de Tradicia Kulturo kaj Folkloro (1989), kaj malfermis la kampon pri homa heredaĵo al "viva kulturo" kaj al ligoj kun aliaj kampoj pri evoluigo, kiel bonfarto kaj edukado. Lingvoj, muziko, danco, ritoj kaj metioj estas nun partoj de la kampo pri kulturo, kaj ilia soci-ekonomia graveco estas pli kaj pli agnoskata. Kiel enkorpiĝo de la kolektiva memoro de komunumoj, tiu vivanta kaj evoluanta heredaĵo plifortigas identecon kaj apartenecon, kaj ankaŭ reziston kaj la kapablon vidi sin mem en estonteco.

## Ligo inter kulturo kaj evoluigo

Vidata kiel spegulo de evoluado de socioj, kulturo estis iom post iom integrata en la internacia tagordo, dum ĝia rolo en daŭripova evoluigo kaj defendo de homaj rajtoj estas pli kaj pli agnoskata, ĉefe per sia kontribuo al socia unuiĝo, laboro kaj novigo. Antaŭenigo de kultura diverseco en la 1990-aj jaroj stimulis revigligi kreemajn resursojn, komprenante, ke la klopodoj por evoluigo ofte malsukcesis pro preterlaso aŭ neglekto de la homa faktoro – la kompleksa reto de interrilatoj kaj kredoj, la diverseco de valoroj kaj aspiroj, kreemaj esprimoj kaj imago. Tiu nova impeto baziĝas sur la kapablo de kulturo vastigi "homajn decidojn... individuajn eblojn por esti sana, edukita, aktiva, kreiva kaj ĝui memestimon kaj homajn rajtojn" (*Our Creative Diversity*, 1996).

La Universala Deklaracio de UNESKO pri Kultura Diverseco, adoptita en 2001, estis mejloŝtono por reaserti la nedisigeblan ligon inter kulturo kaj evoluigo. La principoj de la Deklaracio inspiris serion da reguloj, adoptitaj de UNESKO-membroj, kiuj plivastigis la ideon de kulturo por protektado de subakva kultura heredaĵo (2001), nemateria kultura heredaĵo (2003), diverseco de kulturaj esprimoj (2005) kaj historiaj urbaj pejzaĝoj (2011). Alia paŝo antaŭen estis la Deklaracio pri Intenca Detruado de Kultura Heredaĵo, en oktobro 2003.

## Refari sociajn ligojn

Evoluo en la kompreno pri la rolo de kulturo estas ne nur koncepta. En 2004, dum rekonstruado de la Ponto de Mostar, detruita en 1993 dum milito en Bosnio kaj Hercegovino, la defio estis ne nur restaŭri monumenton, sed ankaŭ venki kolektivan traŭmaton per kunlaboro inter pluraj kulturaj, etnaj kaj religiaj komunumoj, por la rekonstruado. La Interkonsento de Dayton (1995), kiu finis la militon en Bosnio kaj Hercegovino, enhavis sekcion pri protektado de kultura heredaĵo en la kondiĉoj pri respekto al homaj rajtoj. Unuafoje, kultura heredaĵo estis agnoskita kiel fundamenta elemento en pacigo.

Lastatempe, en 2014, la granda projekto de UNESKO en Timbuktuo (Malio), por rekonstruado de detruitaj maŭzoleoj kaj konservado de antikvaj manuskriptoj, denove montras la bezonon kunigi kulturon kaj pacigajn klopodojn. La subteno por rekonstruado de la urbo Mosulo en Irako, parto de la UNESKO-projekto "Revivigi la Spiriton de Mosulo", aŭ la klopodoj sekurigi la kulturan heredaĵon kaj edukan sistemon de Bejruto en Libano, kunordigitaj de UNESKO, estas ekzemploj de iniciatoj kiuj celas ebligi al komunumoj refari sociajn ligojn per rekonstruado de historiaj monumentoj kaj tutaj kvartaloj.



Kreiva kaj kultura sektoroj respondecas por **6,2% de ĉiuj** laborpostenoj de la mondo

Fonto : *(Re)fari politikojn por kreivo,* UNESKO, 2022

## Leviĝo de tutmondiĝo

Tra la jaroj, inter internaciaj konferencoj pri kulturaj politikoj, aperis aliaj temoj. En la konferenco de 1998, Stokholmo (Svedio), en kunteksto de rapida kresko de tutmondiĝo, oni traktis temojn kiel aliro al kulturo, esprimlibereco, partoprena regado, kaj komerco de kulturaj produktoj. Disvolvo de cifereca teknologio profunde ŝanĝas konsumon kaj distribuon de kulturo. Tamen, kvankam tiuj novaj teknologioj ebligis senprecedencan aliron al enhavoj — kaj komencis grandan kreskon de kultura kaj kreiva industrio — ili ankaŭ starigis defiojn, kiel malreguligo de merkatoj, neceso de pli egaleca pago por artistoj kaj kulturaj profesiuloj, ekonomia koncentriĝo, la cifereca divido kaj kultura normaligo. Tiuj aferoj ankoraŭ estas gravegaj.

La estonteco de niaj socioj estas konstruita nuntempe en tutmonda skalo. Amasa turismo, senzorga urba kresko kaj efikoj de klimatŝanĝiĝo minacas gravajn lokojn de la Listo de Mondaj Heredaĵoj, kiel Venecio kaj ĝia laguno, rizterasoj en filipinaj montaroj, Galapago (Ekvadoro), Granda Barilrifo en Aŭstralio, kaj la arbaro Cedroj de Dio (Horsh Arz el-Rab) en Libano.

## Repensi nian interrilaton kun la mondo

Dum la krizo de KOVIM-19, kulturo montris kapablon adaptiĝi kaj rezisti, per solidareco ene de la sektoro kaj kun aliaj kampoj, kiel ekonomio, sano kaj edukado, dum kvarantenoj. Tamen, ankaŭ montriĝis la persistaj fragilecoj de la kultura sektoro, kaj la urĝo repensi ĝiajn fundamentojn.

La konceptoj starigitaj dum lastaj kvardek jaroj ankaŭ formas konceptan fundamenton por normaliga kaj planada laboro de UNESKO. Rilate al Tagordo 2030 por Daŭripova Evoluigo kaj pli, UNESKO havas ŝlosilan rolon, kondukante la internacian dialogon pri novaj defioj. Aferoj kiel kultura diplomatio, lukto kontraŭ ŝakrado de kulturaĵoj kaj resendo kaj restituo al originaj landoj, statusoj de artistoj, esprimlibereco, kreiva ekonomio, efiko de cifereca transformado, daŭripova kultura turismo kaj la rolo de kulturo en klimata agado, estos centraj temoj en la meksika konferenco. La celo estas ne nur klarigi nian estontan agadon, sed restarigi kulturon kiel tutmondan publikan kunhavaĵon.

Oni devas garantii aliron al kulturo — ankaŭ enrete — por ĉiuj, sekurigi kulturan diversecon kiel parton de tutmonda

> “
> **La rolo de kulturo en da□ripova evoluigo estas pli kaj pli agnoskata**

komunaĵo, kaj garantii plenajn kulturajn rajtojn fronte al novaj defioj. Por trakti tiujn gravaĵojn, lokaj kaj naciaj interkonsentoj devas esti subtenataj kaj kunordigataj de la internacia komunumo. Por konstrui inkluzivecajn kaj solidarajn sociojn, estas esence kompreni la transforman rolon de kulturo kiel tutmondan bonon. Gravegas plene konsideri kulturon en konstruado de nova socia kontrakto. Kulturo estas nia rezervujo de signifoj, nia kreiva energio; ĝi konstruas nian senton de aparteno, liberigas nian imagon, nian novigan povon kaj nian decidemon por pli daŭripova estonteco por la bono de la tuta homaro. ■

***-El la angla esperantigis Rafael Lima (Brazilo)***



La unuagrada barilo por kreiva kunlaboro estas manko **de financado**



4 el 10 estroj en artaj kaj kulturaj konsilioj **estas virinoj**

Fonto : *(Re)fari politikojn por kreivo*, UNESKO, 2022

En *La Sekvanto: Kulturo kaj Publikaj Politikoj* UNESKO revizias aperantajn aferojn kaj debatojn pri kulturo por daŭripova evoluigo, kerna temo en la konferenco *MONDIACULT* 2022.

Intervjuo kun
Laetitia Kaci
kaj Laura Berdejo

*UNESKO*

# Yalitza Aparicio:
## "Necesas plibonigi la integradon de la diverseco en kinematografio"

Post brila ĉeesto en la filmo *Roma* de Alfonso Cuarón, kiu gajnis tri Oskar-premiojn en 2019, la meksika aktorino Yalitza Aparicio estas socie engaĝita virino. Kiel ambasadoro de Bonvolo de UNESKO pri Indiĝenaj Popoloj ekde 2019, ŝi ankaŭ subtenas la kampanjon de UN "Mi diras NE al rasismo" kaj kontribuas al la laboro de la Meksika Komisiono pri la Defendado kaj Antaŭenigo de Homaj Rajtoj. Samtempe, ŝi laboras por kolekti monon por lernejoj en sia devenurbo Tlaxiaco, havante konvinkon pri la ŝlosila rolo de edukado por nutri diversecon.

***Post via nomumo por la Oskar-premio, vi iĝis proparolanto por la petoj de indiĝenaj popoloj. Kiel aperis tiu engaĝiĝo? Kiel ĝi manifestiĝas surloke?***

Mia batalo por la agnosko de indiĝenaj popoloj ne naskiĝis subite – ĝi ĉiam ekzistas. Mi delonge komprenis ke tre malmultaj personoj konscias pri la diverseco de la socio, ĉefe pro la manko de ĉeesto kaj plureco de indiĝenaj popoloj en diversaj povpozicioj kaj en la amaskomunikilaro. Do kiam mi havis la oportunon kundividi tiun senton kun la cetero de la socio, mi ne hezitis fari tion, ĉar por pozitivaj ŝanĝoj en la socio necesas la subteno de ĉiuj. Temas pri teama laboro.

***En la lastaj jaroj, la filma industrio estis kritikata pro sia manko de diverseco. Ĉu vi kredas ke la sintenoj estas ŝanĝiĝantaj?***

Dum multaj jaroj, indiĝenaj popoloj estis prezentataj en la filmindustrio en tre stereotipa maniero. Kun la paso de la tempo, tamen, la socio komencis kompreni kiom gravas ke indiĝenaj popoloj kaj aliaj agantoj de kultura diverseco estu pli bone reprezentataj. Kiel modelaj roloj, ili antaŭenigas inkluzivecon per siaj rakontoj kaj estas vidataj kiel agantoj de ŝanĝo. Tiu industrio havas siajn proprajn normojn, sed ni komencis rompi kelkajn el tiuj bariloj denuncante antaŭjuĝojn kaj proponante pli inkluzivan perspektivon per konkretaj agoj. Tamen, ankoraŭ restas multo farenda por ŝanĝi aferojn.

> **"Por pozitiva ŝanĝo en la socio necesas ĉies subteno**



© UNESCO / Christelle ALIX

*Yalitza Aparicio en sia nomuma ceremonio kiel Ambasadoro de Bonvolo de UNESKO pri Indiĝenaj Popoloj, en oktobro 2019, Parizo.*

***Kion la kulturaj industrioj gajnus estante pli malfermaj al indiĝenaj kulturoj?***

Pli bona reprezentado de tiuj kulturoj ebligus al homoj pli bone kompreni nian identecon kaj la kulturan riĉecon kiu ekzistas en ĉiuj partoj de la mondo, ĉar ĉiu kulturo estas mondo kiu atendas esti malkovrita. Ankaŭ, pli da malfermeco helpus nin disvolvi socion malfermitan al ŝanĝo kaj pli inkluzivan, ne nur je diskursa nivelo, sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo.

> **“ Ĉiu kulturo estas malkovrinda mondo**

***Kiuj estas la ĉefaj bariloj de la videbleco de indiĝenaj popoloj?***

Temas sendube pri la manko de toleremo kaj respekto al diverseco, kiun ni vidas en sintenoj kiel la diskriminacio bazita sur vestado, haŭtkoloro aŭ certa tipo de fizionomio. La videbleco de indiĝenaj popoloj estas ankaŭ malhelpata de neegalaj ŝancoj kaj manko de konscio pri iliaj unikaj kaj aŭtentikaj kulturoj.

La manko de rekono de indiĝenaj lingvoj estas alia granda barilo, ĉar ĝi devigas iliajn parolantojn esprimi sin en alia lingvo por integriĝi en la socio, dum ĝi ankaŭ malplivalorigas ilian denaskan lingvon.

***La kulturo de indiĝenaj popoloj estas minacata. Kion oni povas fari por konservi ĝin?***

Por kolektive konservi la kulturan identecon de ĉiu grupo, ni bezonas prioritatigi edukadon, ĉar ĝi estas la nura maniero atingi homojn je ilia plej profunda nivelo kaj influi ilian disvolviĝon. Sed tiu edukado devas esti altkvalita kaj doni al lernantoj la ilojn kiujn ili bezonas por konscii pri la diverseco de la socio. En la eduka medio, ĉu lernejo ĉu universitato, ĉiu infano kaj junulo povas konsciiĝi pri kulturaj diferencoj. Edukado povas ebligi al ili la rekonon, el ilia propra monda vidpunkto, de la unikeco de ĉiu individuo. ■

***-El la angla esperantigis Manuela Burghelea (Brazilo)***

## La ajmara ne diris sian lastan vorton

Kvankam vaste parolata, la ajmara lingvo kundividas multajn el la vundebloj de aliaj indiĝenaj lingvoj. Sed en la lastaj jaroj ĝi gajnis pli bonan rekonon, kio kondukis al politikaj, kulturaj kaj teknologiaj progresoj. Ekde majo 2022, eblas uzi Google-tradukilon por traduki la ajmaran. Tio estas la plej nova teknologia progreso por la ajmara lingvo, parolata de pli ol du milionoj da homoj en Bolivio, Ĉilio kaj Peruo. Kaj ĝi ne estas la ununura. En la lastaj jaroj, multiĝis poŝtelefonaj apoj celantaj la komunumon. “Killa” konektas parolantojn de la ajmara kun prisanaj laboristoj, dum “Felisa Yanapiri” prezentas virtualan asistadon ebligantan al boliviaj virinoj koni siajn rajtojn kaj eskapi la cirklon de genro-bazita perforto. Tiaj iniciatoj helpas la lingvon integriĝi en la teknologia mondo kaj cetere povas bremsi ĝian malkreskon.

La ajmara devenas de anda regiono de la lago Titicaca kaj estas la tria plej parolata indiana lingvo, post la keĉua kaj la gvarania. Malgraŭ ĝia granda parolantaro, la situacio de la lingvo restas fragila kaj simptoma por la vundebleco de aliaj indiĝenaj lingvoj. Laŭtakse, el la ĉirkaŭ 6 700 lingvoj parolataj en la mondo, pli ol 2 300 estas minacataj, ĉar ili ne estas sufiĉe praktikataj – kaj la plejparto de ili estas indiĝenaj.

Parolantoj de indiĝenaj lingvoj emas asocii sian malavantaĝan socian statuson kun sia kulturo kaj konsekvence ofte rezignas pri sia lingvo por venki diskriminacion. Tamen, la perdo de unika historio, kulturo kaj naturmedia kono, kiu okazas kiam lingvo mortas, estas neriparebla. Por atentigi pri la malkresko de indiĝenaj lingvoj kaj pri la neceso konservi ilin, Unuiĝintaj Nacioj proklamis la periodon inter 2022 kaj 2032 la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj.

Rilate al la ajmara lingvo, ĝi montris kelkajn signojn de revigliĝo en la lastaj jaroj. Ĝi nun atingis formalan statuson kiel oficiala lingvo en Bolivio kaj Peruo, kio rezultis el pli bona politika kaj kultura agnosko. En Peruo, ekzemple, la publika televidstacio komencis freŝdate elsendi novaĵojn en la keĉua kaj la ajmara, kio estas novaĵo en la historio de la lando. Cetere, en 2009, la nemateria kultura heredaĵo de ajmaraj komunumoj en Bolivio, Ĉilio kaj Peruo estis elektita por la Registro de Bonaj Konservaj Praktikoj fare de la Komisiono de UNESKO pri Nemateria Kultura Heredaĵo.

Alwa, unu el la unuaj rapistoj de Bolivio, reprezentas novan generacion kiu ne hezitas atesti la reakiritan dignecon de indiĝenaj popoloj. Surhavanta la tradician *pollena*, larĝan bolivian jupon, kaj la tipan nigran ĉapelon *bombín*, la junulino, kies persona nomo signifas “tagiĝo”, baldaŭ publikigos sian unuan albumon post sia sukceso en *Tiktok*.

***-El la angla esperantigis Manuela Burghelea (Brazilo)***

Joey Akan
Ĵurnalisto en Lagoso

# La videoflua amafero de *Nollywood*

La film-industrio de Niĝerio produktas ĉ. 2 500 filmojn ĉiujare. Kun sia rapida kaj malmultekosta modelo de produktado, la t.n. "*Nollywood*" fariĝis unu el la plej fekundaj film-industrioj de la kontinento. La intereso de la ĉefaj ciferecaj platformoj instigis ŝanĝojn favore al pli bone financataj kaj pli diversaj filmoj.

*Nollywood*, kiel oni nomas la film-industrion de Niĝerio, randas eksplodon. Pluraj videofluaj platformoj, speciale la usona kompanio *Netflix*, svatas lokajn produktantojn. La niĝeria film-industrio estas do ŝvelanta kun projektoj kaj investoj. *Netflix*, kiu startis kun multa videbleco kaj vigleco en 2020, jam establis sin kiel ĉefgvidanto en la industrio, engaĝis sin al originalaj filmoj kaj al la ellaboro de novigo kaj progreso. En decembro de la lasta jaro, *Amazon Prime Video* subskribis plurjaran interkonsenton kun *Inkblot Studios*, afrika produktejo, kiu kreis iujn el la plej sukcesaj filmtitoloj de Niĝerio. Ĝi estas la unua licenca kontrakto, kiun la videoflua kompanio starigis kun afrika produktejo. Post la kinejaj prezentadoj, *Amazon* posedos la ekskluzivajn kaj tutmondajn rajtojn por la aro de titoloj de *Inkblot*.

> **Videofluo plenumis multajn promesojn, de aliro al kapitalo kaj trejnkursoj ĝis kontribuoj al infrastrukturo**

La sento en Lagoso, komerca kaj kreada centro de Niĝerio, estas pri entuziasmo. Filmistoj sentas la impulson esti konektitaj al monda spektantaro. Videofluo plenumis multajn promesojn, de aliro al kapitalo kaj trejnkursoj ĝis kontribuoj al infrastrukturo. Aldone al la stimulo de spektantaro laca de oftaj vizitoj al kinejoj, ĝi grandigis la elekteblecon de filmoj disponeblaj al la spektantoj. "Estis ŝanĝo en la tipo de filmoj, kiujn oni faras", diras filmreĝisoro Imoh Umoren. "Nun ni faras pli bele enkadrigitajn scenojn, kiel meksikaj televidaj melodramoj… Ĉar ni provas konkuri kun prezentaĵoj en la usona kanalo HBO, ni emas imiti ilian stilon."

## Meteora ascendo

*Nollywood* rapide kreskis depost la 1990-aj, kiam ĝi unue videbligis sin. La niĝeria film-industrio rapide populariĝis malgraŭ siaj difektoj – komence *Nollywood* estis ĉefe karakterizata de ĝiaj grandkvantaj kaj malmultekostaj ĉiusemajnaj lanĉoj. Kritikistoj plendis pri limigitaj buĝetoj, maldensaj intrigoj kaj ripetiĝemaj dialogoj.

Kvankam tiu periodo estigis klasikaĵojn kiel *Living in Bondage*, *Glamour Girls* kaj *Nneka The Pretty Serpent*, la intrigoj kutime koincidas kun ripetiĝantaj temoj, kiuj inkluzivas interrilatajn dramojn, venĝojn kaj ekspluatadon de sorĉo.

Profitemaj filmfaristoj regule elkuiris malmultekostajn, haste faritajn filmojn, dum la industrio baraktis kontraŭ la rapida kresko kaj nesatigebla avido pri novaj produktaĵoj tra la kontinento. Komence de la 2000-aj oni produktis ĝis 50 filmojn ĉiusemajne, kun jara sumo de pli ol 2 500.

La plej multaj filmoj de *Nollywood* estis kreitaj por la malgranda ekrano kaj ili estis plej spektataj en DVD- aŭ video-formato. Troproduktado fine rezultigis merkatan saturiĝon. "Kiam oni havas buĝetajn limigojn kiel ni havis, oni ĉefe prezentas dramojn, ĉar dramo temas pri la vivo de la popolo", diras Naz Onuzo, kunfondinto de *Inkblot*.

## Tempo por filmoj

Ŝanĝo okazis en la fruaj jaroj de la 2000-aj, kiam filmfaristoj komencis enkinejigi lokajn produktaĵojn. Tio markis turnopunkton por la industrio. En 2006, la niĝeria film-industrio ekfaris filmojn kun nova aliro en ĉiuj fazoj, en strebo elsavi la suferantan industrion. La nova ondo firmiĝis per *The Figurine*, fare de Kunde Afolayan en Niĝerio. Filmfaristoj – inter ili Afolayan, Chineze Anyaene, Obi Emelonye, Stephanie Linus, Jeta Amata kaj Mahmod Ali-Balogun – adoptis malsaman merkatikan strategion por fortigi la produktistajn financojn. Tiu nova strategio revenigis *Nollywood*-on al la kinejoj. En kinejoj, la niĝeriaj filmfaristoj povis allogi precipe urban mezklasan spektantaron. Kiel konsekvenco, *Nollywood* eniris la oran epokon de film-premieroj kaj pligrandigis merkatumajn kampanjojn tra la kontinento.

Tiu ŝanĝo venis kun siaj defioj. Niĝerio – kun loĝantaro de pli ol 200 milionoj da




© JC Moschetti

*Bazaro Idumota, la centro de niĝeria film-distribuado en la 2000-aj jaroj.*

homoj – havis nur 77 kinoekranojn en 2020 kiel indikas la UNESKO-raporto “La afrika film-industrio: tendencoj, defioj kaj ŝancoj por kresko” (2021). La plej multaj situas en la ĉefaj urboj. Estas ankoraŭ konsiderata kiel luksaĵo al kinejo en lando kie 40 elcentoj de la loĝantaro vivas sub la limo de malriĉeco.

La regado de iuj potenculoj super film-distribuado prezentas alian obstaklon. Filmfaristoj en Niĝerio devas navigi tra la politiko de film-industrio por havi siajn filmojn akceptataj kaj montrataj tra la lando. En 2021, veterana filmfaristo Mildred Okwo havis sian filmon *La Femme Anjola* forigita de la ĉefaj kinejoj posedataj de *FilmHouse Cinema*, la plej granda ĉeno en Niĝerio. “*FilmHouse* forigis nin el ĉiuj kinejoj… Mi kredas, ke tio celas lasi spacon al ilia nova filmo. Estas iliaj kinejoj kaj ili faras, kion ili volas”, Okwo skribis en *Twitter*.

La mesaĝo de Okwo instigis debaton en la industrio, en pluraj frontoj. *FilmHouse* estas ligita al *FilmOne*, produkta kaj distribua kompanio. La frataj kompanioj donas al la kinejo-posedantoj forton fari filmojn, distribui ilin kaj uzi sajn kinejojn en ŝlosilaj lokoj por havi prioritaton. Pro ilia granda partopreno en la merkato, la plej sukcesaj filmoj bezonas longan tempon de videbleco en *FilmHouse*. Kaj por certigi tion, filmfaristoj hastas ekhavi *FilmOne* kiel distribuanton.

> “Por loĝantaro de 200 milionoj, Niĝerio havis nur 77 kinejojn en 2020

En precipe konservativa lando, iuj filmoj konsiderataj polemikaj povas ofendi. Aprile de 2014 la tutmonde sukcesa *Half of a Yellow Sun* (*Duono de Flava Suno*) restis forbarita dum monatoj. La filmo pritraktas la Civilan Militon inter Niĝerio kaj Biafro, unu el la plej brulaj ĉapitroj de la historio de la lando.

## Freŝaera spiro

Videofluo ebligas pli grandan liberecon en tiu kunteksto. “Ĝi donis al la filmfaristoj la esperon fari pli da filmoj kaj almenaŭ ni povas havi ion por subteni se oni ne povas enirigi ilin en la kinejojn”, rakontas Blessing Uzzi, filmreĝisoro kies debuta filmo *No Man’s Land* (*Nenies Lando*), estas ĉi-jare aperonta. “Se la videofluaj kompanioj ne estus tie ĉi, mi ne estus farinta *No Man’s Land* en Niĝerio”, ŝi diras.

La alfluo de kapitalo el la gigantoj de videofluo prezentas klaran okazon por filmfaristoj plivastigi siajn viziojn. Kun pli bona aliro al kapitalo, lokaj produktistoj povas iom revi, krei pli bonajn filmojn. La rezultoj jam sentiĝas. *Nollywood* altiris sian unuan buĝeton je unu miliono da dolaroj, danke al la lasta projekto de produktisto Editi Effiong, politika suspensfilmo kun la titolo *La Nigra Libro*. Bandoj de drogoŝakristoj de Niĝerio el la 1980-aj estas reprezentataj en la lanĉota filmo. ■

***El la angla esperantigis***
***James Rezende Piton (Brazilo)***

Kristján Guðjónsson
*Islanda ĵurnalisto*

# Islando: Nova rigardo al malnova lingvo

Kiam multlingva laborgrupo pri literatura verkado por virinoj estis malfermita en komunumo de enmigrintoj en Rejkjaviko en 2015, neniu povis antaŭdiri ĝian efikon. Kun la apogo de la ĉefurbo de Islando, kiu estis honorita kiel Uneska Kreiva Urbo de Literaturo, tiu ĉi iniciato ebligis senprecedencan literaturan spacon por novuloj, kiu prosperas ankoraŭ hodiaŭ.

Islandanoj konsideras sin kiel nacion de poetoj kaj legantoj. Kun 360 000 loĝantoj, la roka nordatlantika insulo havas literaturan tradicion, kiu sin etendas ekde la 13-a jarcento, kaj tian rezistan lingvon, ke la klasikaj vikingaj sagaoj ankoraŭ estas legeblaj sen multe da malfacilaĵoj. Libroj estas la plej kutimaj kristnaskaj donacoj kaj la kvanto de novaj islandaj titoloj ĉiujare publikigitaj estas impona por tiel malgranda lingva grupo. Kiel ajn, izoliteco kaj lingva protektemo ekde longa tempo apartigis enmigrintajn verkistojn for de la islanda literatura rondo.

"Kiam mi la unuan fojon alvenis Islandon, ne estis multe da spaco por verkistoj de eksterlanda deveno. Ni estis malmultaj kaj tendencis al segmentado", klarigas la en Kanado naskita poeto kaj interfaka artistino Angela Rawlings, kiu translokiĝis al Rejkjaviko en la komenco de la lasta jardeko. Tamen la medio por aŭtoroj rapide ŝanĝiĝas, parte pro multlingva verkada laborgrupo, kiun ŝi iniciatis.

"La unua planto, kiu setlas sur nuda roko, estas musko", diras Angela kaj prenas notblokon por skizi sian botanikan alegorion pri la literatura rondo. "Mi pli bone povas pensi, kiam mi skribas kaj desegnas samtempe", ŝi diras, skizante rokon kaj fadenojn da muskoj. "Necesas multe da muskoj por fari bonan grundon, en kiu pioniraj plantoj sekve povas ekradiki."

En 2015 Angela lanĉis kvin-monatan verkadan seminarion, malferman por ĉiuj virinoj, sendepende de ilia gepatra lingvo. La organizado de ĉi multlingva verkada laborgrupo estis unu el la iniciatoj de Rejkjaviko kiel Uneska Kreiva Urbo de Literaturo. La ĉefurbo de Islando ricevis tiun honoran titolon en 2011 pro sia aktivado pri konservado kaj subteno de literaturo, kaj kiel rezulto, ankaŭ iĝis parto de Uneska Reto de Kreivaj Urboj. Unu el la ambicioj de tiu urba reto estas atingi pli diversan publikon per evoluo de la literatura rondo.

## Demografiaj tendencoj

Malgraŭ tio, ke Islando ankoraŭ estas relative homogena nacio, ĝia populacio draste ŝanĝiĝis dum la lastaj jardekoj. En la lastaj jaroj de la 1990-a jardeko nur du procentoj de la loĝantoj estis enmigrintoj de la unua aŭ dua generacioj. La loĝantoj ankoraŭ estis preskaŭ nur blankhaŭtuloj, havis tradiciajn patriarkajn familiajn nomojn, finiĝante per *-son* aŭ *-dóttir*, kaj parolis la islandan lingvon. Kvaronjarcenton poste la kvanto de enmigrintoj altiĝis al dek ses procentoj. Rilate al integrado kaj reprezentado en politiko kaj kulturo, ĉi tiu rapida ŝanĝo starigis kelkajn defiojn.

La multlingva skribada laborgrupo estis efektivigata en biblioteko en Breiðholt, kiu estas la komunumo plej diverseca en



© Patrik Ontkovic

*Laborgrupo pri kreiva verkado, ebligita de la pola aŭtorino Ewa Marcinek en Rejkjaviko en Junio 2020.*

## *ResiliArt*: Tutmonda klopodo por subtenadi artistojn kaj kulturon

Necertaj kontraktoj, ofte ŝanĝiĝantaj laborhoroj, arbitraj salajroj: jam antaŭ la krizo de KOVIM-19, tutmonde multaj artistoj penadis por vivteni sin. Ĉiel ajn, la pandemio plimalbonigis la situacion en la kreiva ekonomio.

Pro tio UNESKO lanĉis *ResiliArt* en aprilo 2020 – tutmondan movadon, en kiu partoprenas profesiuloj pri kulturo tra la mondo. Ĝi prilumas la nuntempan staton de la kreiva industrio per virtualaj diskutoj kun artistoj kaj la socio. La temoj inkludas la financajn konsekvencojn de la sankrizo sur la profesioj en la kreiva medio; rimedoj por subteni artistojn; kiel evoluigi kulturan politikon kaj financajn modelojn, kiuj taŭge respondas al krizoj, precipe rilate al la stato de la artisto.

Ĝis nun, *ResiliArt* estas tre bonvenigata de artistoj kaj kulturaj profesiuloj en pli ol 115 landoj, stimulinte pli ol 300 debatojn. Ĝi generis kaj tutmonde kaj regione specifajn rekomendojn pri konsultaj mekanismoj inkludantaj la socion; plivastigo de investoj kaj diversigo de financado por kulturaj projektoj; justa pagado al kreintoj en la cifereca medio kaj pri la reutiligo de neuzataj konstruaĵoj por ebligi la publikan alireblecon de ili kiel kulturaj infrastrukturoj.

Lanĉita dum la pandemio, *ResiliArt* celas certigi la daŭrigon de konversacioj, interŝanĝadon de datumoj, kaj la apogon de klopodoj longe post la ĉesiĝo de la pandemio. La opinioj kaj vidpunktoj, kiuj estis esprimataj dum la sesioj, donas al registaroj, decidantoj kaj la privata sektoro sciaron pri rezistopovo en la kreiva sektoro, ebligita per amaskunlaboro, por estigi rezistopovon en la kultura kaj kreiva industrioj.

Por informi la preparan proceson de la Monda Konferenco pri Kulturaj Politikoj kaj Daŭripova Evoluigo, *MONDIACULT*, kiu okazos en septembro 2022, UNESKO plivastigas la movadon de *ResiliArt* por kolekti surloke kontribuojn pri la daŭre evoluantaj bezonoj, mankoj kaj ebloj. Sub la titolo *ResiliArt* x *MONDIACULT*, pli ol 50 debatoj estis organizitaj, kunigante artistojn, kulturajn profesiulojn, akademianojn kaj aktivistojn por kontribui al ĉi tiu historia momento por kulturpolitiko.

***-El la angla esperantigis Frank Lappe (Germanio)***

Rejkjaviko laŭ etnoj kaj lingvoj. Virinoj de ĉiu sociala deveno ĉeestis la eventon. Kelkaj el ili estis spertaj aŭtoroj, kelkaj estis veraj komencantoj, aliaj revis pri publikigado de libroj, kaj aliaj partoprenis la eventon nur por plezuro. Ĉi tiuj 15 virinoj, parolante 22 malsamajn lingvojn, renkontiĝis semajne kaj interŝanĝis siajn verkojn. Angela konfesas, ke tia lingva diverseco bezonis netradician aliron al aŭskultado, legado kaj interŝanĝo de opinioj. “Ekzistas traktmanieroj pri la sentuma enhavo de tekstoj, kiuj ne fokusiĝas al semantiko aŭ sencofarado.”

Unu el la partoprenintoj estis Ewa Marcinek, devenanta el la urbo Vroclavo en Pollando. Post persona krizo ŝi vojaĝis eksterlanden kaj fine restis en Rejkjaviko, kie ŝi trovis laboron en la sektoro serva kaj klopodis lerni la islandan lingvon. “Mi konsideris la seminarion kiel eblon esti inter samopiniaj virinoj, kaj mi sentis min bonvena, ĉar mi sciis, ke mi povas partopreni sen esti kapabla paroli la islandan”, ŝi diras.

> “
> **Kiam mi la unuan fojon alvenis Islandon, ne estis multe da spaco por verkistoj de eksterlanda deveno**

### Multlingva literatura revuo

Je la fino, la seminario estis pli ol nur unufoja evento; ĝi iĝis movado, kiu ankoraŭ daŭras. Forta komunumo estiĝis dum la semestro kaj multaj el la virinoj daŭrigas regulajn renkontojn post la fino de la projekto. Poste la kolektivo ekgastigis poeziajn eventojn sub la nomo *Ós* (= ‘riverbuŝo’ en la islanda). Pro ilia malfacilo kompreni la lokajn literaturajn revuojn, ĉiujn publikigatajn islandlingve, ili simple fondis sian propran revuon, *Ós – The Journal*. “Ni demandis nin mem: kiu interesiĝus pri publikigado de tekstoj en la angla aŭ pola aŭ hispana? Kaj kiu interesiĝus pri la voĉoj de virinaj enmigrintoj? Ni sentis, ke nenio okazus, se ni ne farus tion mem”, diris Ewa. Proksimume 30 aŭtoroj estas publikigitaj en ĉiu volumo, do hodiaŭ, la tekstoj de 180 geaŭtoroj estis publikigitaj en malsamaj lingvoj.

*Ós* tute ŝanĝis la literaturan rondon por internaciaj novalvenintoj en Islando. Nun ili havas spacon por aperigi siajn verkojn sendepende de siaj lingvoj. Tio jam estis la kazo, kiam Helen Cova, naskita en Venezuelo, alvenis. Ŝi enamiĝis, kiam ŝi pasigis siajn feriojn en Islando, kaj decidis translokiĝi al la malgranda norda insulo kaj edziniĝi. Jam en Karakaso ŝi revis esti aŭtoro, sed ŝi neniam konsideris tion kiel realisman karieran opcion. Kiam ŝi rakontis al kelkaj islandaj amikoj pri sia ideo de infanlibro, oni tuj atentigis →

ŝin pri *Ós*, la multlingvaj platformo kaj komunumo de fremdlandaj aŭtoroj.

“Tio plifaciligis aferojn por mi. *Ós Pressan* jam ekzistis, mi ne devis krei ĝin”, Helen konsideras per retkamerao el sia domo en Flateyri, fiŝkaptista vilaĝo kun proksimume 250 loĝantoj, situanta apud la okcidentaj fjordoj. Dank' al *Ós*, ŝi aŭdis pri multlingva verkista laborgrupo, ebligita de Angela en 2019. Estis surprizo por ŝi, kiam ŝi eksciis, ke miksi kaj esplori malsamajn lingvojn, inkluzive de malperfekta islanda, estas permesate. “Kiel enmigrinto oni kutime tendencas al tia miksado, sed gravas eksperti, ke tio fakte estas enorda en literaturo. Pro tio tiaj laborgrupoj estas tiel valoraj: ili donas al iu memfidon.” Ŝiaj surrealaj mikronoveloj estis aperigitaj pasintjare sub la titolo *Autosarcophagy, to eat oneself* (*Aŭtosarkofagio, manĝi sin mem*). Ĉi tiu estis ŝia unua libro publikigita sub la ombrelo de *Ós*, verkita en la angla, sed ankaŭ havebla kiel islanda traduko.

> **“**
> **Ós tute ŝanĝis la literaturan mondeton por internaciaj novalvenintoj en Islando**

© Ós Pressan & Rubén Chumillas




◥ *Kovrilo de* Ós – The Journal *(n°6-2022), islanda literatura revuo, en kiu eksterlandaj novalvenintoj povas publikigi siajn verkojn, sendepende de la lingvo.*

## Malfermi pordojn por la sekva generacio

La vizaĝo de islanda literaturo ŝanĝiĝas. Nun estas publikigataj ankaŭ libroj kaj kolektaĵoj de fremddevenaj aŭtoroj sen tradiciaj familinomoj. En pli vasta senco, islanda muziko, teatro, kinarto kaj vidaj artoj iĝas pli diversaj, pli da akĉentoj aŭdeblas kaj neblankuloj nun povas aŭdigi siajn voĉojn. Angela diras, ke tio estas fakto festinda: “Tio povas doni novan rigardon al lingvo, kiu havas tiel longan historion, kaj tio povas plivastigi la uzadon de la lingvo. Pli da homoj uzas la islandan lingvon – kaj amas ĝin.”

Plie, laŭ Ewa la vigleco de la kulturo dependas de la inkluzivigo de enmigrintoj. “Kulturo kaj arto devus speguli la realon. Kulturo kiu ignoras 15 procentojn de sia popolo ne povas prosperi. Enmigrado estu vidata kiel oportuno: ĝi ne estas minaco al la kulturo, sed pliriĉigo por ĝi.”

Ŝia unua poezia libro *Islando Polurigita (Iceland Polished)*, miksas la anglan, polan kaj islandan por priskribi la spertojn de enmigrintoj. La plej granda eldonejo de Islando publikigis la libron komence de ĉi jaro – kaj ĝi iĝis unu el la unuaj libroj verkitaj de pol-islandaj geaŭtoroj en la lando, spite al la fakto, ke poloj estas la plej granda minoritato en Islando. Ewa esperas, ke ŝia ekzemplo inspiros aliajn. “Se iu pola junulo troviĝas ie, kaj legas en la gazeto, ke pola aŭtoro estis publikigita, tio povas doni esperon al li. Pro tio estas tiel grave, ke tiuj malsamaj tekstoj kaj nomoj estas videblaj en la kultura vivo.” ■

***-El la angla esperantigis Frank Lappe (Germanio)***

Noé Pignède
*Ĵurnalisto en Bejruto*

# *Wijhat* vivigas artajn projektojn en Bejruto

Ĉiujare ekde 2017, tiu organizo, bazita en la libana ĉefurbo, helpis dekojn da artkreantoj el la araba regiono realigi siajn projektojn aŭ prezenti sin eksterlande.

En la aŭditorio de la Tournesol-teatro en Bejruto, tondraj aplaŭdoj bonvenigas la eminentan libanan reĝisoron Eliane Raheb kaj Michel Jleilaty, la ĉeffiguron en ŝia lasta dokumenta filmo *Miguel's War*. Ĉirkaŭ 200 spektantoj ĉeesti la prezentadon de la rakonto de ĉi tiu kristana milicano. Lia servo kun la Libanaj Trupoj finiĝis en ekzilo pro la civila milito (1975-1990).


© Tarek Moukaddem

◥ *Dank' al subvencio de* Wijhat, *la dancisto Serge Moawad povis lerni en la Vaganova Akademio en Sankt-Petersburgo (Rusa Federacio).*

> **Projektoj ekster la ŝablonoj pli malfacile konvinkas investantojn**

Michel rivelas sian malhelan flankon same kiel siajn traŭmatojn en tiu intima rakonto. "La rolulo povus esti unika," insistas Eliane Raheb, "sed la mesaĝo estas universala", aldonante, ke ŝi venkis malfacilaĵojn por financi la projekton. "En Libano, la kultura sektoro vere ne povas fidi je publika financado. Tio signifas, ke sendependa filmproduktanto devas serĉi subtenon eksterlande." Sed projektoj ekster la ŝablonoj aŭ kiuj pritraktas delikatajn temojn, pli malfacile konvinkas investantojn. "Mi uzis multe el mia propra mono por fari la filmon", ŝi konfidas. "Tiam mi turnis min al pli →

progresemaj formoj de financado, kiel la subvencio *Wijhat*."

Financita de la tut-araba NRO *Mawred*, subtenata de privataj fondaĵoj kaj internaciaj agantoj, kiel la Eŭropa Komisiono kaj la Sveda Artkonsilio, *Wijhat* ("destinoj" en la araba) ebligas al ĉirkaŭ tridek artistoj el la regiono la realigon de projektoj ĉiujare. Stipendio je 7 000 eŭroj estas aljuĝita al la artistoj. "Nia financado celas ĉiujn arabajn artistojn sen distingo, sendepende de ilia fako, reputacio aŭ loĝlando. Nia celo estas ebligi al ili pasigi tempon eksterlande", klarigas Areej Abou Harb, la direktoro de la programo. De Maroko ĝis Egiptujo, la asocio celas antaŭenigi kulturajn interŝanĝojn en la araba mondo. "Kun militoj en Sirio kaj Jemeno, malstabileco en Irako kaj la krizo en Libano, la krea mondo bezonas subtenon pli ol iam ajn", ŝi diras en sia bejruta oficejo.

## Ekonomia krizo

Libanaj artistoj estis forte trafitaj de la ekonomia krizo, kiu lasis multajn luktantajn por vivteni sin per sia arto en la lando, kie la nacia valuto perdis 95 elcentojn de sia valoro en tri jaroj, kaj kie la monata minimuma salajro nun estas limigita al 30 usonaj dolaroj kompare kun 450 antaŭ 2019. Tio detruis la lokan scenejon, dum prezentado eksterlande povas esti kiel obstaklokurejo.

> "La kreiva mondo bezonas subtenon pli ol iam ajn

Sen la subvencio *Wijhat*, Fadia Loubani neniam estus povinta prezenti sian virinan teatran grupon en Danio. La trisemajna eksterlanda turneo, en la lasta septembro, lasis daŭran impreson sur la aktorinoj. "Estis kiel sonĝo", ridetas Hala, en siaj dudekjaroj. "Kia ŝanco finfine vidi ion alian ol nian ĉiutagan rutinon!" Kiel la aliaj aktorinoj en la teatraĵo, ŝi venas de Bourj el Barajneh, palestina rifuĝejo sude de Bejruto.

"Ĝis la aviadilo alteriĝis en Kopenhago, mi ne povis kredi tion", diras Maha, kvindekjara, kun leopard-desegna koltuko sur la hararo. "Mi tro timis esti seniluziigita." Solene titolita *Jen ni*, la teatraĵo rakontas ilian malfacilan ĉiutagan vivon. En la teatraĵo, la ses aktorinoj parolas pri amo, soleco kaj la diskriminacio, kiun ili suferas en ankoraŭ tre patriarka socio.

Unu el ili parolas pri la malakcepto de ŝia komunumo, ĉar ŝia edzo suferas de skizofrenio. Alia, instruistino, rakontas pri sia lukto por edukado kaj virina emancipiĝo. Tria virino rakontas la morton de sia edzo pro koronaviruso kiel rezulto de manko de medicina prizorgado. "La publiko estis konkerita. Kiam ni ploris, ili ploris kun ni. Kiam ni ridis, ili ridis kun ni", ridetas Maha, ankoraŭ mirigita, ke la trupo furoris tra tuta Danio. "Mi ne atendis, ke



© Albaqer Jafeer

*Bildo de la dokumenta filmo* Take me to the Cinema *(2021) (*Portu min al kinejo*), reĝisorita de Albaqer Jafeer kaj produktita kun la subteno de* Wijhat. *Per rakonto pri iraka soldato serĉanta ŝirmejon en forlasitaj kinejoj, la filmo pridubas la estontecon de kinejoj en la lando.*



© ALD production / Darine Lama

*En sia monologa prezento* Another Lover's Discourse *(*Parolado de alia amanto*) Riham Issac, artisto kaj ricevinto de* Wijhat*, esploras personajn rilatojn en arabaj socioj.*

tiom da eksterlandanoj interesiĝus pri niaj rakontoj."

## Realigi vian revon

Ne ĉiu projekto povas esti financita de *Wijhat* - eksterlanda institucio devas unue doni la verdan lumon por gastigi trupon, artiston en loĝejo, aŭ ekspozicii verkon. La dancisto Serge Moawad povis tiel ricevi subvencion por pasigi tempon en la prestiĝa Vaganova Akademio en Sankt-Petersburgo, Rusio, kio ebligis al li perfektigi sian teknikon "kun la plej bonaj instruistoj en la mondo".

Veninta el modesta familio, li sciis, ke la ŝancoj disponeblaj al li estas limigitaj. " En Libano, ne ekzistas strukturo por profesiaj baletistoj. Mi faris ĉiuspecajn laborojn por pagi miajn vojaĝojn al Eŭropo. Tiel mi povis vojaĝi al Bukareŝto kaj Prago. Sed la malplivalorigo de la libana pundo faris ĉion ĉi tre malfacila."

La 21-jarulo nun loĝas en Parizo, kie li aliĝis al danckompanio. "Mi ne estus tie kie mi estas hodiaŭ sen mia tempo en Sankt-Petersburgo", diras la buklahara dancisto, kun la vizaĝo enkadrigita de etaj okulvitroj. "Danke al *Wijhat*, mi povis realigi mian revon." Serge revas iam reveni al Libano por fondi danclernejon "kaj transdoni mian pasion al la venonta generacio".

***-El la angla esperantigis Ursula Grattapaglia (Brazilo)***

LARĜA ANGULO

Wang Qin

*Profesoro ĉe la lernejo de Sociologio de Soochow University, la esplorado de Wang Qin fokusiĝas pri historio kaj la disvolviĝo kaj uzado de informaj rimedoj.*

# En Suzhou, la nokto apartenas al kultura heredaĵo

La urbo Suzhou en orienta Ĉinio estas fama pro siaj kanaloj, pontoj kaj klasikaj ĝardenoj. Nuntempe ĝi uzas ciferecan teknologion por utiligi sian riĉan kulturan heredaĵon kaj akceli sian ekonomion. Ekde la lanĉo de la iniciato "Gusu 8:30 p.m.", vizitantoj amasiĝas al la loko - ne nur tage sed ankaŭ nokte.

Klientoj servataj de okupataj vendistoj en tradicia ĉina vestaĵo; turistoj mergantaj sin en multegon da produktoj – la sceno de la vespera foiro sur la strato Canglangting en la Kreiva Urbo de UNESKO Suzhou memorigas pri la antikva ĉina pentrarto.

Lokita en Jiangsu-provinco, Suzhou posedas riĉan arkitekturan kaj artan heredaĵon, kiu igas ĝin grava turisma celo. La urbo estas hejmo de ses elementoj de Nemateria Kultura Heredaĵo de UNESKO kaj du ejoj de Monda Heredaĵo de UNESKO, inkluzive de la klasikaj ĝardenoj de Suzhou kie situas la Pavilono Canglang. Ene de la Pavilono, viva prezentado mergas spektantojn en la dramon kaj ĝojojn de Shen Fu kaj Madame Yun, roluloj en la 200-jara aŭtobiografio de la ĉina verkisto Shen Fu, *Ses ĉapitroj pri flosanta vivo*. La paro vestitaj per broditaj kostumoj el Suzhou-silko promenas tra la ĝardeno. Vizitantoj sekvas ilin dum ili faras teon, ĝuas la lunon, bruligas incenson, aranĝas florojn, komponas poemojn, aŭskultas muzikon kaj kantas melodiojn.

## Revizii la klasikaĵojn

Ĝis nun, la merga adapto de la klasika verko pruvis grandan sukceson: ĝi estis prezentita ĉirkaŭ ducent fojojn kaj altiris 25 000 spektantojn en malpli ol du jaroj ekde 2018, starigante nacian rekordon por nove adaptitaj operprezentoj.

*Ses ĉapitroj pri flosanta vivo* asimilas elementojn de *Kunqu*-opero – formo de ĉina opero karakterizita per kombinaĵo de kanto kaj recitalo kaj de kompleksa sistemo de dancartaj teknikoj, akrobataĵoj kaj simbolaj gestoj – kun la klasikaj ĝardenoj de Suzhou kaj de la urboj ĉe la antikva akvorando, kiel Zhouzhuang kaj Tongli.

> **"La iniciato de "Gusu 8:30 p.m." instigas la reinterpreton de la riĉa kultura heredaĵo de la urbo por allogi vizitantojn**

La prezento donas bonan ekzemplon de la urba iniciato "Gusu 8:30 p.m.".

Ĉi tiu iniciato estis lanĉita de la Distrikto Gusu de Suzhou en decembro 2019 por stimuli la reinterpreton de la riĉa kultura heredaĵo de la urbo kaj allogi vizitantojn per spektakloj, ekskursoj, manĝaĵoj, butikumado ktp. La celo estas akceli la noktan ekonomion kaj kulturajn kaj kreivajn industriojn de Suzhou etendante la atingon de kultura konsumo kaj diversigante la oferton, kaj sekve, krei pli da laborpostenoj. Diversaj stadioj de la kultura produktadĉeno estas subtenataj, inkluzive de dezajno, fabrikado, transportado, merkatado kaj administrado.

## Nokta turismo

La iniciato de "Gusu 8:30 p.m." enkondukas la riĉan kulturan heredaĵon en novajn, kreivajn kaj ofte ciferecajn formatojn. Prenu, ekzemple, la noktan ekskursprogramon "Nova Ora Epoko de Suzhou", interaga sperto kie strataj piedirantoj vivas per realtempa interagado, hologramoj kaj lumaj efikoj. Vizitantoj ekkomprenas la lokan kulturon kaj povas trovi itinerojn, kiuj kombinas manĝaĵon, loĝadon, vojaĝon kaj distron.

Proksimume 180 000 vizitantoj ĉeestis en la unua nokta prezentado en aprilo 2020, sukceso kiu helpis plifortigi la ekonomion post la ekapero de KOVIM-19.




◥ *Nokta vido de la urbo Suzhou.*

La nokta turisma programo reproduktas la prosperon de Suzhou kiel bildigitan en *La Ora Epoko de Suzhou*, fama ĝenropentraĵo de 1759. Ĉi tiu unuaklasa kultura relikvo en Ĉinio prezentas stratbutikojn vendantajn silkon, muzikinstrumentojn, teon kaj porcelanon. Ĝiaj antikvaj muroj, riveroj, stratoj kaj stratetoj ankoraŭ ekzistas hodiaŭ en Suzhou, kaj ili fariĝis gravaj kulturaj heredaĵoj de la urbo.

## Plonĝu en la koron de nemateria kultura heredaĵo

Klopodoj por montri la kulturan heredaĵon de la urbo ne estas limigitaj nur al ĝiaj stratoj, ili moviĝis en la ciferecan regnon.

Ekzemple, foliumante la kanalon de "Feiyiban" en la video-fokusita socia interkonekta servo Douyin, spektantoj trovos sin absorbitaj en viglaj pruvoj de kultura heredaĵo kiam ili malkovras la laboron de metiistoj kiuj ekspozicias la kudrerojn de Suzhou-brodaĵo kaj pliprofundigas la teknikojn engaĝitajn. Ludante la popularan interretan ludon nome *Honoro de Reĝoj*, ludantoj vidos kudrerojn karakterizajn de Suzhou-brodaĵo enkorpigitaj en la rolulaj dezajnoj. Simile, enirante la ciferecan sperthalon de la Suzhou-a Muzeo, vizitantoj havas la eblon renkonti la Dudek kvar Sunperiodojn – la tradician ĉinan kalendaron kreitan de kamparanoj, listigitan kiel Nemateria Kultura Heredaĵo de UNESKO – kun ĉiuj siaj sensoj.

> "
> **La sukceso de la unua nokta prezentado helpis al la plifortigo de la ekonomio post la ekapero de KOVIM-19**

Ekzemploj kiel ĉi tiuj montras kiel riĉa kultura heredaĵo – kaj rilata ekonomio – povas esti revigligita per eksterordinara kreivo kaj uzo de cifereca novigado. Tiu ĉi koncepto pruviĝis fruktodona en Suzhou, kies nokta ekonomio multe akceliĝis. Pli ol 11 000 kompanioj estis parto de la noktaj agadoj ĝis la pasinta septembro. En 2021, la pokapa elspezo de Suzhou por edukado, kulturo kaj distro grimpis je 32,7 procentoj kompare kun la antaŭa jaro. ■

***-El la angla esperantigis Joel Muhire (Kongo Kinŝasa)***



# Nov-Delhio kun rideto, de Vineet Vohra



Fotoj: Vineet Vohra

Teksto: Katerina Markelova,
UNESKO



En siaj senĉesaj vagadoj tra la stratoj de sia lando, Hindio, Vineet Vohra kaptas kun malico momentfotojn de bildoj same neverŝajnaj kiel efemeraj. La vizio de ĉi tiu agnoskita majstro de stratfoto estas ĉe la antipodoj de la tipaj bildoj asociitaj al la hinda metropolo.

Fidela subtenanto de la koncepto de hazardo – kun la natura kapablo koincide trovi ion, kio ne estas serĉata – Vohra ruze kaptas neatenditajn momentojn kiujn la ĉiutaga vivo proponas al ni, kaj ilin kaptas per sia fotilo, montrante kamuflitan pordon en reklamo, kokon kun homa kapo aŭ pasanton kies ĉapelo miksiĝas kun fruktoj de bazara budo.

Tiuj svingoj de hazardo kolektitaj en iu ajn angulo de la urbo, neatenditaj kaj ekscitaj, estas disponeblaj por ĉiuj, ĉiam kaj kiam oni atentas pri ili. La bildoj kaptitaj de Vohra proponas ripozon, malfermas malpeze la pordon de la simpleco, la ĉiutaga kaj la banala vivo, kaj restas sublimigitaj per la kapablo de komponado kaj perspektivo. "La fotisto enamiĝas al momento. Lia tasko konsistas en kapto de tiu momento", klarigas la aŭtoro. Vohra faras tion kun vera majstreco. ■

***-El la hispana esperantigis Kim Ribeiro (Brazilo)***







Nov-Delhio kun rideto, de Vineet Vohra




MEGRAJ PAN



Nov-Delhio kun rideto, de Vineet Vohra


New Look & Jaiswal



Nov-Delhio kun rideto, de Vineet Vohra








Nov-Delhio kun rideto, de Vineet Vohra



© Courtesy of Refik Anadol Studio

◥ **Ne kontrolite – Maŝinaj halucinoj – Songôj de MoMA,** *turk-usona cifereca artisto Refik Anadol. La serio estas produktita de modelo de Artefarita Inteligenteco kiun la artisto trejnis per metadatenoj de la Muzeo de Moderna Arto de Novjorko. Ĝi estos disponebla al kolektantoj kiel NFT.*

Catherine Hickley

*Ĵurnalisto kaj aŭtoro kun bazo en Berlino*

# NFT antaŭenigas la merkaton de cifereca arto

Dum la lastaj jaroj, rekordaj vendoj per Ne Disigeblaj Ĉifraktivoj (NFT, angle *non-fungible tokens*) firmigis novan tendencon en la arta mondo. Ĉi tiuj sekuraj kaj aŭtentigitaj ciferecaj iloj faciligas la akiron de virtualaj artaĵoj, kreas novajn oportunojn por artistoj kaj instigas muzeojn interesiĝi pri cifereca arto. Ĉu ni atestas veran revolucion aŭ spekulan bobelon?

Multe da homoj kiuj ankoraŭ ne sciis pri blokĉeno kaj ĉifromono, unue informiĝis en marto 2021 pri Ne Disigeblaj Ĉifraktivoj, kiam la aŭkciejo *Christie's* vendis la mozaikon *Ĉiutagoj – la unuaj 5 mil tagoj (Everydays – The First 5,000 Days)* de artisto konata kiel Beeple (lia vera nomo: Mike Winkelmann) kontraŭ la okulfrapa prezo de 69 milionoj da usonaj dolaroj. Dank'al tiu ĉi vendo, Beeple – ĝis tiam nekonata en la tradicia arta mondo – fariĝis unu el la plej altkostaj vivantaj artistoj. Tio kaptis la atenton de la tutmonda gazetaro kaj instigis frenezan spekuladon pri NFT-platformoj.

Tiu orserĉado daŭras, malgraŭ sinsekvaj inflacioj kiuj influis la ĉifromonan merkaton. Sendepende de la sinsekvo de tio, NFT jam efikis sur la historion de arto. Multaj fakuloj pri cifereca arto taksas la prezon de tiu verko de Beeple (neniu sekva NFT-vendo alproksimiĝis al tiu valoro) kiel rezulton de evolua procezo komenciĝinta meze de la pasinta jarcento.

## Turnopunkto por cifereca arto

"Ni ĉiuj estis surprizitaj de tiuj altaj prezoj por NFT-aĵoj, sed ni verŝajne ne devus tiom surpriziĝi", diris Alfred Weidinger, direktoro de la muzeo Oberösterreiches Landesmuseum en Linz, Aŭstrio. "Cifereca arto estas nenio nova. Ĝi daŭre evoluas, kaj eĉ NFT-aĵoj ekzistas de iom da tempo."

Unu el la muzeoj kiujn Weidinger administras, la artmuzeo Francisco Carolinum en Linz, festis la 95-an naskiĝtagon de Herbert W. Franke, pioniro de cifereca arto, per ekspozicio – kaj NFT-vendoj por enspezigi lian fondaĵon. Ĉi tiu aŭstria pioniro, kiu ankaŭ estas sciencfikcia verkisto kaj fizikisto, kreis abstraktan algoritman arton per komputilo jam en la 1960-aj jaroj.

> **Ĉifraktivigo estas maniero transformi ciferecan artaĵon en unikan objekton**

Gravas kompreni, ke NFT-aĵoj mem ne estas artaĵoj. NFT estas simpla ĉifraktivo, aŭ certigilo, kun unika kodo sekura de blokĉena protokolo – datumbazo kaj transdona teknologio, prilaborita por esti travidebla kaj sekura samtempe. La plej ofte uzata protokolo estas Ethereum. NFT povas esti alkroĉita al ajna speco de informo: atestilo pri domposedo, bileto por koncerto, interreta memeo aŭ foto de via kato. Aŭ eĉ artikolo de sociaj retejoj – tagojn post la vendo de Beeple, la bitentreprenisto Sina Estavi aĉetis per NFT la unuan pepaĵon de la ekzekutiva direktoro de *Twitter*, Jack Dorsey, kontraŭ 2,9 milionoj da usonaj dolaroj (Estavi provis revendi ĝin por pli alta profito jaron poste, sed malsukcesis: la plej alta oferto estis je 6 800 usonaj dolaroj).

## Unikaj objektoj por filatelistoj

La utiligo de NFT-aĵoj multe interesas la artan mondon. El la vidpunkto de artisto, ĉifraktivigo estas specifa maniero transformi ciferecan artaĵon en unikan objekton venditan kaj kolektitan kaj senfine reprodukteblan. Ĝi amplekse malfermas mondon de novaj eblecoj kaj ŝancoj al artistoj en la cifereca kampo.

"NFT-oj estas amuza ilo por artistoj", diris Dirk Boll, prezidanto de la aŭkciejo *Christie's* por Eŭropo kaj Mezoriento. Li komparas la aperon de NFT-teknologio kun la lanĉo de hejma aparato por vitroblovado en la 1960-aj jaroj. "Ekzistis grandega liberigo de kreivo en vitra arto", Boll diris. "Tio ĉi estas komparebla momento por cifereca arto."

*Quantum*, produktita en 2014 fare de la usona artisto Kevin McCoy, estas konsiderata la plej unua NFT-aĵo. La projekto evoluis kunlabore kun la teknologo Anil Dash kaj Rhizome – organizaĵo sub la Nova Muzeo de Nuntempa Arto en Novjorko. Inter →

la plej fruaj kolekteblaj verkoj estas *CryptoPunks*, aro de 10 mil pikseligitaj karaktroj kreita en 2017 fare de Matt Hall kaj John Watkinson.

Famaj ciferecaj artistoj kiel ekzemple Refik Anadol, Kevin Abosch kaj Nancy Baker Cahill jam aplikis NFT-teknologion. Helpe de sia *Rocket Factory*, la usona artisto Tom Sachs, interesiĝanto pri kosmo, invitis kolektantojn aĉeti NFT-an pecon de cifereca raketo. Reala raketo estos lanĉita samtempe: se ĝi estos reprenita, la posedanto de la NFT-aĵo ankaŭ ricevos la realan pecon.

## Denaskaj cifereculoj aliĝas

NFT malfermis la artan mondon al novaj publikoj. La generacio de denaskaj cifereculoj, kiuj aĉetas ilin, havas demografian fonon malsaman ol tiu de vizitantoj de aŭkciaj domoj kaj artgalerioj. Multaj eniras en la NFT-mondon per komputilaj ludoj kaj ĉifromono – pro tio la granda valoro akirita de la verko de Beeple, animacia kaj grafik-desegna artisto kiu ofte mokas la teknologian mondon kaj ornamas sian arton per referencoj de populara interreta kulturo.

Laŭ Boll, la NFT-a merkato sin nutras plejparte "per homoj kun ĉifromono, kiuj ne scias kion fari per ĝi" kaj ankoraŭ ne estas por malkuraĝuloj. En sia antaŭparolo por la *Raporto pri la Arta Merkato 2022*, Marc Spiegler, tutmonda direktoro de Art Basel – internacia artfoiro organizita ĉiujare en Bazelo, Svislando, skribis ke ĝi (NFT) estas "radike pli plena de spekulado" ol la analoga merkato. La escepta kresko de valoro en 2021 estis "pelita de tempodaŭro de mallonga vendado", li diris, aldonante, ke "averaĝe, artaj NFT-aĵoj estas posedataj dum iom pli ol monato antaŭ ol esti revendataj".

La tuta merkata valoro de NFT-aĵoj en 2021 estis preskaŭ 18 miliardoj da usonaj dolaroj, laŭ datumoj de la retejo nonfungible.com. El tio, 2.6 miliardoj rilatas al arto. En la unua trimonato de ĉi tiu jaro, la volumo de komerco iomete malpliiĝis. Granda provo alfrontis la merkaton en majo 2022, kiam pli ol 300 miliardoj da usonaj dolaroj estis forigitaj en tri tagoj rezulte de ĉifrovaluta katastrofo.

> "La merkato pri NFT-aĵoj estas pli plena de spekulado ol la analoga merkato


## Momento de la vero

Tio povas, siavice, kaŭzi la maturiĝon de la merkato, diris Boll. "Estos granda momento de vero", li diris tagojn antaŭ la kraŝo. "Homoj komprenos, ke ekzistas kelkaj artaĵoj ja interesaj kiel NFT-aĵoj, kaj miliono da ili, kiuj tute ne estas."

La aŭkciejoj *Christie's* kaj *Sotheby's* rapide eniris la NFT-merkaton. Kelkaj artgalerioj sekvis – ekzemple, en aŭgusto pasintjare la artgalerio König Galerie en Berlino lanĉis MISA, kiun ĝi priskribis kiel "la unua NFT-platformo pri arto en la mondo".

Sed estas multaj obstakloj por ordinaraj artmerkataj agantoj, kiuj devas esti tre atentaj. Posedanto de NFT-aĵo, male ol posedanto de fizika artaĵo, ne havas posedon de ĝi – anstataŭe ĝi situas virtuale, ekster la regado de la posedanto. Kio okazus kaze de bankroto de la platformo? Oni penas estigi juran medion konvenan al la teknologio, tamen daŭre restas riskoj.


Unu el la plej grandaj malavantaĝoj estas la karbona problemo de NFTs – oni kalkulas karbonemisiadon kaŭzatan de NFT-vendoj sur la blokĉeno de Ethereum



© Herbert W. Franke / Archive art meets science

◥ Cellular Automata *(1992-1998) de aŭstria artisto Herbert W. Franke, unu el la pioniroj de komputada arto, kiel scienc-fikcia verkisto kaj fizikisto.*

© Mundissima / Shutterstock




CC BY 4.0 by Mike Winkelmann

◥ Ĉiutagoj – la unuaj 5 mil tagoj *konsistas el 5 000 ciferecaj desegnaĵoj kreitaj de usona artisto Beeple kun rapideco de po unu peco ĉiutage por plibonigi siajn desegnajn kaj grafikajn kapablojn. La atestilo pri proprieto (NFT) de ĉi tiu mozaiko estis vendita* kontraŭ *69 milionoj da usonaj dolaroj en 2021.*

◤ *Unu el la 5,000 bildoj en la glumozaiko de Beeple, prezentante viron alfrontante gigantan toron en arida pejzaĝo.*

proksimume same granda kiel tiu kaŭzita de monata elektro-uzo de unu persono vivanta en Eŭropunio. Pli daŭripova teknologio survojas, kaj iuj blokĉenoj jam estas pli energiefikaj. NFT-simpatiantoj substrekas, ke la tradicia arta merkato ne estas pli mediamika pro tio, ke oni multe flugas al komercaj foiroj, ekspozicioj kaj bienaloj tra la mondo, kaj ekspedas artaĵojn de unu kontinento al alia.

## Muzeoj aliĝas al la agado

Ankaŭ muzeoj eniris la NFT-trajnon, per vendo de ĉifritaj versioj de klasikaj artaĵoj por enspezi dum la stagna tempo kaŭzita de la pandemio. La artgalerio Uffizi en Florenco, ekzemple, vendis NFT-aĵon de *Doni Tondo* de Mikelanĝelo pasintjare kontraŭ 140 000 eŭroj. Sed Weidinger substrekas, ke ĝi ne estas vendo de la artaĵo. Li kompare taksas tiajn ĉifraĵojn kiel "fridujajn magnetojn".

Boll ankaŭ priskribis ilin kiel tre multekostaj varoj de muzebutikoj. "Muzeoj profitas de fenestro, kiu baldaŭ fermiĝos, ĉar homoj rimarkos, ke ĝi ne estas vere interesa", li diris. "Ili forĝas dum la fero estas fandita."

Tiu fenestro eble estas fermiĝonta: Belvedere de Vieno ofertis 10 mil NFT-ojn pri partoj de la *Kiso* de Gustav Klimt okaze de Sankt-Valentena tago ĉi-jare. Malpli ol kvarono estis vendita komence de majo, laŭ la loka gazetaro. La prezo de tiuj revendataj en alia merkato estis malpli alta ol la 1 850 eŭroj pagitaj de la unua aĉetanto.

Weidinger diris, ke malmultaj muzeoj aĉetis NFT-ojn de cifereca arto por siaj propraj kolektoj. Lia muzeo estas la sola en Aŭstrio kiu akiris ilin. Alia rimarkinda afero estas la ZKM (Centro por Arto kaj Amaskomunikado) en Karlsruhe, kiu aĉetis NFT-ojn ree en 2017, kvar jarojn antaŭ la vendo de Beeple, kaj nun montras ilin en ekspozicio nomata "Ĉifrarto: ne temas pri mono" (Crypto Art: It's Not About Money).

Tamen ja estis la granda monsumo, kiu unue atentigis la ĝeneralan publikon pri NFT. La vendo de Beeple, diris Weidinger, funkciis kiel veka alvoko, kio signifas, ke finfine "muzeoj adaptiĝas kaj faras siajn hejmtaskojn pri cifereca arto". ■

***-El la angla esperantigis Chimedtseren Enkhee (Mongolio)***




© Fransisca Angela por UNESKO-Kuriero

*Eka Kurniawan en sia hejmo en Ĝakarto, Indonezio (printempo 2022).*

Intervjuo farita de Agnès Bardon

UNESKO

# Eka Kurniawan:

## “Estus bonege vivi ĉirkaŭate de homoj, kiuj legas literaturon el la tuta mondo”

Ekde la apero de lia unua romano, *Cantik itu Luka (Beleco estas Vundo)* en 2002, la indonezia verkisto Eka Kurniawan konstruis verkaron, kiu gajnigis al li internacian renomon. Inspirite de mitoj kaj kredoj de lia lando, liaj nekutimaj rakontoj, en kiuj li kombinas banalecon kun poezio kaj fantazion kun realismo, estis tradukitaj en pli ol 30 lingvojn.

***Vian infanaĝon vi travivis en vilaĝo en Javo, insulo en la sudokcidento de Indonezio. Kiel vi ekinteresiĝis pri literaturo? Kia leganto vi estis tiam?***

Mi loĝis kun miaj patrinaj geavoj en tre fora vilaĝo ĝis mia dekjariĝo. Ili estis terkultivistoj kaj laboris ĉefe en rizkampoj. Mi sciis nenion pri literaturo tiutempe, sed maljunulino, parenco de mia avino, kutime rakontis ekzotikajn kaj magiajn rakontojn en la verando de nia domo por distri la infanojn. Mi pensas, ke tio estis la unua fojo, kiam mi sentis veran intereson pri rakontoj kaj la maniero rakonti ilin. Poste, mi ofte aŭskultis radiodramojn. Mia unua kontakto kun literaturo, sub libra formo, okazis kiam mi transloĝiĝis al Pangandaran, malgranda vilaĝo ĉe la suda marbordo de Javo, ĉe miajn gepatrojn. Mi tiam ĉeestis elementan lernejon kaj, kiel ĵusalveninto al la najbaraĵo, mi ne havis amikojn. Bonŝance, proksime de la busstacidomo, estis malgranda “biblioteko”, budo de unu kvadrata metro, kie oni pruntis librojn kontraŭ malmultaj moneroj. En tiu epoko mi legis multajn horor- kaj luktosportromanojn, kelkfoje ankaŭ krim- kaj amromanojn. La plimulto de ili estis netaŭgaj por infanoj, sed la budmastro ne tro multe atentis mian aĝon. Tiutempe mi jam komencis provi skribi miajn proprajn rakontojn.

***Kie vi skribas?***

Mi povas skribi ie ajn, kondiĉe ke homoj lasu min labori kaj ne parolu al mi. Kiam mi komencis skribi, mi alprenis la kutimon fari tion en la domo de miaj gepatroj, en la kuirejo. Mian unuan romanon mi verkis en luita ĉambro en Jogjakarto. Mi transloĝiĝis al Jogjakarto en 2003 kaj komencis verki mian duan romanon en skribkajero dum mi estis atendanta mian koramikinon por kune tagmanĝi. Nuntempe, mi skribas hejme, sed kelkfoje mi iras al proksima kafejo kaj laboras tie (kiel mi faras ĝuste nun, respondante viajn demandojn dum mi atendas por alpreni mian filinon post ŝia elliro el lernejo).

→




© Fransisca Angela por UNESKO-Kuriero

◥ *Eka Kurniawan fondis la eldonejon Moooi Pustaka por diskonigi eksterlandajn verkintojn al la indonezia publiko.*

***Vi estas ankaŭ ĵurnalisto. Kiel romano fariĝis la rimedo, per kiu vi priskribas la mondon?***

Mi mallonge laboris kiel ĵurnalisto. La oficon mi lernis en universitata revuo, kaj poste oni petis ke mi skribu por alia revuo, kiu deziris publikigi pli longajn artikolojn apartenantajn al la tiel nomata "literatureca ĵurnalismo". Tiam mi dediĉis min al la legado de tiuĝenraj referenclibroj, kiel *Hiroŝimo* de John Hersey aŭ *Malvarmsange* de Truman Capote. Kvankam mian verkaron influis diversaj fontoj, mi agnoskas, ke mi multon lernis el ĵurnalismo. Aparte pri la organizado de la okazaĵoj kiel rakontaj elementoj. Tamen, kiam tiu revuo ĉesis aperi, mi ĉesis labori kiel ĵurnalisto. Mi trovis novan laboron en filmprodukta kompanio kaj rekomencis verki novelojn kaj romanojn en mia libera tempo. Mi opinias, ke romano estas perfekta formo por priskribi universon. Ĝi ebligas al mi konstrui rakontojn alireblajn mikse el realisma vidpunkto – kiel en ĵurnalismo – kaj el fantazia (foje stranga) vidpunkto, influita de la malkaraj romanoj, kiujn mi legis kiam mi estis adoleskulo, aŭ la popolfabeloj kiujn la maljunulino kutimis rakonti kiam mi estis infano.

"Ni povis legi la literaturaĵojn de García Márquez kvazaŭ liaj verkoj disvolviĝus en tropika provinco de Indonezio

***Via gepatra lingvo estas la sunda, sed vi verkas en la indonezia. Kian rilaton vi tenas kun via gepatra lingvo?***

Mi fakte preskaŭ neniam skribas en la sunda lingvo, kvankam mi ja povas legi kaj skribi en ĝi. La sunda lingvo estas pli ĝuste la parola lingvo, kiun mi uzas kun mia familio aŭ iuj el miaj najbaroj. Same kiel multaj indonezianoj de mia generacio, mi komencis uzi la indonezian lingvon ekde la unua jaro de la elementa lernejo, ĉar ĝi estas la oficiala lingvo uzata en lernejoj kaj oficialaj institucioj. Tiel do por mi, de la komenco mem, la indonezia estis skriba lingvo kaj mi ne devis adapti mian pensmanieron, kiam mi komencis skribi. La fakto estas, ke en Pangandaran, kie mi kreskis, estas parolataj pluraj lingvoj, i.a. la sunda kaj ankaŭ la java lingvoj. Dank' al tio mi povis familiariĝi kun tiuj du lingvoj kaj poste kun la indonezia, kiu fojfoje estas uzata kiel pontlingvo inter homoj kiuj ne komprenas sin reciproke en la ceteraj du lingvoj. Kiel verkisto, mi ofte prunteprenas vortojn aŭ gramatikajn konstruaĵojn de la sunda aŭ de la java se ili pli bone funkcias en frazo. Ĉiaokaze, kiel kreanto, mi havas la privilegion povi fari tion.

***Ekde la apero de via unua romano,* Cantik itu Luka *(*Beleco estas Vundo*), viajn rakontojn, en kiuj miksiĝas fantazio kaj ekzotismo, graco kaj teruro, oni ofte komparas kun la magia realismo de Gabriel García Márquez. Ĉu vi rekonas vin mem en ĉi tiu komparo?***

Mi povas kompreni tiun komparon. Mi legis multajn verkojn de García Márquez kiam mi studis en universitato kaj ankaŭ de aliaj latinamerikaj verkistoj. Fine de la naŭdekaj jaroj, ĉio rilata al Latinameriko vekis multe da intereso ĉi tie, precipe pro politikaj kialoj. Ni, studentoj, starigis paralelon inter Suharto kaj la latinamerikaj militistaj diktatoroj, la influo de religiaj estroj (katolikaj kaj islamaj) sur la socio, mistikaj kulturoj kaj malriĉeco. Estis tiom da simileco, ke ni povis legi la literaturaĵojn de García Márquez aŭ iu ajn alia latinamerika verkisto kvazaŭ iliaj verkoj disvolviĝus en tropika provinco de Indonezio!

***En via dua romano,* La Tigro-Viro*, la ĉefrolanto, kiu brutale murdas alian homon, kulpigas pri siaj agoj la tigron ekzistantan ene de li. Ĉu temas pri metaforo pri la besto vivanta en ĉiu el ni? Kiu estas la rolo de mitoj en via verkado?***

Fakte ne temas pri psikologia aŭ freŭda rakonto, kvankam kompreneble oni povas legi ĝin de tiu vidpunkto. Verdire, de mia vidpunkto, la tigro estas tre reala. En Indonezio multaj homoj kredas



© Fransisca Angela por *UNESKO-Kuriero*


© Fransisca Angela por UNESKO-Kuriero

je tiuj fenomenoj. Kiel mi jam diris, en mia infanaĝo mi ofte aŭskultis tiujn strangajn rakontojn rilatajn al mitaj kredoj, tamen mi ne deziras, ke miaj rakontoj estu nur mistikaj aŭ fantastaj. Kvankam ili enhavas mistikajn elementojn, mi volas ke ili reflektu la mondon, en kiu ni vivas, la problemojn, kiujn ni alfrontas kaj la politikon, laŭ kiu ni traktas, t.e. la interagon de povoj. La mistikaj elementoj de miaj verkoj povas ŝajni familiaraj al miaj legantoj kaj tio eble – espereble – vekos ilian scivolon, sed ankaŭ malfermos la pordon al simbolismo. Tial la leganto povas konsideri la tigron de la romano ankaŭ kiel simbolon.

> “
> **Mi fojfoje min demandas de kie venas tiu intereso pri la verkoj de verkisto el tre fora vilaĝo kiel mi**

***Vi fondis sendenpendan eldonejon Moooi Pustaka, kiu eldonas librojn de eksterlandaj verkistoj tradukitajn el siaj originalaj lingvoj en la indonezian. Kio igis vin entrepreni tion?***

En la lastaj jaroj miaj libroj estis eldonitaj en multaj landoj, ĉefe en landoj kun malmultnombraj loĝantaroj – iuj malpli loĝataj ol la urbo Ĝakarto, kiu havas pli ol 10 milionojn da loĝantoj. Mi fojfoje min demandas de kie venas tiu intereso pri la verkoj de verkisto el tre fora vilaĝo kiel mi, kun kulturo kaj eĉ klimato tiom malsimilaj. Mi estas tre ĵaluza. Mi opinias, ke estus bonege vivi ĉirkaŭate de homoj, kiuj legas literaturon el la tuta mondo. Kiam mi vojaĝas, mi ĉiam vizitas librovendejojn kaj ĉiam miras pri la diverseco de libroj, kiujn oni tradukas kaj eldonas.

Tio naskis ĉe mi la deziron reprodukti la saman diversecon en Indonezio. Sendube iuj eldonistoj jam faris tiun taskon en la pasinteco kaj eĉ ankoraŭ faras ĝin, sed multe da interesaj verkoj restas tradukotaj. Alia problemo, kiu prezentiĝas, estas tio, ke la plimulton el tiuj libroj oni tradukas el la angla, sendepende de ilia originala lingvo. Por mi tio senvalorigas iagrade la enhavojn, ĉar la britaj aŭ usonaj eldonistoj filtras la klason de literaturo, kiun ni povas legi. Mi opinias, ke ni devas streĉi niajn fortojn por traduki originalajn tekstojn, ĉefe verkojn nepopularajn en anglalingvaj landoj. Tiel mi proponis al kelkaj amikoj starigi malgrandan eldonejon specialiĝintan pri monda literaturo kaj antaŭnelonge ni sukcesis startigi tiun projekton. ■

***-El la hispana esperantigis Pablo León (Argentino)***

PLI DETALE

Mila Ibrahimova

UNESKO

# Nuna stato: Diverseco de la kulturaj esprimoj

Kvankam la kultura kaj krea kampo estas unu el la plej rapide kreskantaj ekonomiaj sektoroj en la mondo, ĝi suferas pro drasta manko de investoj, laŭ raporto de UNESKO nomata *(Re)fari politikojn por kreivo: trakti kulturon kiel tutmondan komunan bonon (Re/Shaping Policies for Creativity: addressing culture as a global public good)*, publikigita en februaro 2022.

Dek milionoj da laborpostenoj en la kultura kaj krea industrioj estis perditaj tra la mondo en 2020 pro la pandemio de KOVIM-19. Ĉar la akcelita transiro de kultura enhavo kaj prezentadoj en ciferecaj platformoj estas klara tendenco, kiu ekestis en la krizo, ekzistas urĝa bezono ellabori pli justajn sistemojn de kompenso al artistoj, kies produktoj estas rete konsumataj.

***-El la angla esperantigis James Rezende Piton (Brazilo)***



## Kulturo kaj kreemo

### KIE NI STARAS?

Kulturo kaj kreemo kontribuas al la tutmonda ekonomio

3,1% de la monda MNP

6,2% de ĉiuj laborpostenoj

La monda Malneta Aldonvaloro en la kultura kaj krea industrioj **reduktiĝis** je

US$ 750 MILIARDOJ EN 2020.

10 MILIONOJ da postenoj en kulturo kaj kreado estis perditaj en 2020 tutmonde



# MOVEBLECO

Artistoj, speciale tiuj el evoluantaj landoj, alfrontas defiojn en la aliro al financado, vizoj, informoj, trejnado kaj kultura infrastrukturo.

Tiuj kun pasportoj el industriigitaj landoj rajtas viziti averaĝe **169 LANDOJN** sen vizo

Tiuj kun pasportoj el evoluantaj landoj rajtas viziti nur **86 LANDOJN** sen vizo

79% de la loĝlokoj de internaciaj artistoj estas en **Eŭropo kaj Nordameriko**

Sud-al-suda movebleco restas malfacila parte pro nesufiĉa regiona konektebleco

### KIO ESTONTECE?

- Re-imagi moveblecon en manieroj pli ciferece alireblaj kaj daŭripovaj
- Liveri administran subtenon al artistoj, aldone al la financado
- Certigi egalecan reprezentadon en moveblecoj
- Plibonigi subtenon por regiona movebleco inter evoluantaj landoj

# DIVERSECO EN LA AMASKOMUNIKILOJ

### DIFERENCOJ EN LA MEZURADO INTER LA ŜTATOJ

**48%** atentas egalecan reprezentadon de seksoj en la amaskomunikiloj

**51%** atentas la redaktan sendependecon de la amaskomunikiloj

**54%** atentas retajn amaskomunikilojn

**59%** atentas la diversecon en la posedo de amaskomunikiloj

### KIO ESTONTECE?

- Limigi la koncentriĝon de posedo de komunikiloj, certigi travideblecon kaj subteni iniciatojn de lokaj amaskomunikiloj
- Starigi celojn por diverseca reprezentado sur kaj ekster la ekranoj
- Finance subteni lokan kreadon por ebligi al amaskomunikaj iniciatoj atingi enhavajn kvotojn
- Investi en la kolektado de datumoj kaj en sistemoj de mezurado kaj taksado de amaskomunikiloj

Fonto: *(Re)fari politikojn por kreivo*, UNESKO, 2022

PLI DETALE

# **RETA** ENHAVO

**Reta aktiveco kreskas**
Inter 2016 kaj 2021 eksplodis la reta aktiveco

## 62,1% DE LA ENTUTA ENSPEZO PRO MUZIKO

venis el retfluoj en 2020

## HOROJ SPEKTATAJ EN *NETFLIX*

ĉiuminute iris de

69 444 al 584 222

## HOROJ AŬSKULTATAJ EN *SPOTIFY*

ĉiuminute iris de

38 052 al 196 917



## KIO ESTONTECE?

- Ellabori negoc-modelojn, kiuj juste kompensu la kreantojn de reta enhavo
- Investi en loka enhavo kaj plibonigi ĝian troveblecon en ciferecaj platformoj





# SEKSA EGALECO

Iniciatoj de seksa egaleco starigitaj de registaroj kaj de neregistaraj organizoj (progreso laŭ sektoro):

| | |
|---|---|
| Kinarto | 65% |
| Aŭdvido | 65% |
| Muziko | 13% |
| Eldonado | 13% |
| Prezentarto | 9% |

**Reprezentiĝo de virinoj restas malalta en**

32% Naciaj art-premioj

33% Film-premioj

8% Prezentadoj kiel dirigento

25% Prezentadoj kiel diskĵokeo

30% Laboro en videoludoj

53% **de la landoj** regule kolektas kaj diskonigas datumojn por kontroli la egalecon de seksoj en la sektoroj

EN AFRIKAJ ŜTATOJ **tio estas 17%,** kio elmontras la grandan diferencon inter regionoj

## KIO ESTONTECE?

- Efektivigi memasertajn agadojn en dungado, promociado, financado kaj premioj
- Forigi malstabilajn laborpraktikojn en la kultura sektoro, kiel mallongajn kontraktojn, longajn laborhorojn kaj diferencojn de salajroj.
- Fari daŭrajn klopodojn por mezuri kaj kontroli la progreson survoje al la egaleco de seksoj kaj seksa diverseco
- Adopti kaj fortigi politikojn kaj aplikeblan leĝaron en la antaŭenigo de seksa egaleco

Fonto: *(Re)fari politikojn por kreivo,* UNESKO, 2022

# Novaj Eldonaĵoj




## Ĵurnalismo estas komuna havaĵo

### Mondaj Tendencoj en Libereco de Esprimo kaj Amaskomunikila Disvolviĝo


### Tutmonda Raporto 2021/2022

**ISBN 978-92-3-100509-1**
**160 p., 215 × 280 mm, poŝlibro, 55 €**
**Eldonejo de UNESKO**

Sendependa ĵurnalismo estas en danĝero. La rapida erozio de la komercaj modeloj subtenantaj amaskomunikilan daŭripovon profundigis la krizon en la libereco kaj sekureco de ĵurnalistoj tra la mondo.

Dum la lastaj kvin jaroj, proksimume 85 procentoj de la monda loĝantaro spertis malpliiĝon de gazetara libereco en sia lando. Eĉ en landoj kun longa historio de protektado de libera kaj sendependa ĵurnalismo, financaj kaj teknologiaj transformoj kaŭzis fermon de amaskomunikiloj, precipe tiuj servantaj lokajn komunumojn. La pandemio de KOVIM-19 kaj ĝia tutmonda ekonomia efiko pliseriozigis ĉi tiun tendencon kaj nun minacas krei "amasestingon" de sendependa gazetaro.

La eldono 2021/2022 ekzamenas ĉi tiujn demandojn kun speciala fokuso sur "ĵurnalismo kiel publika havaĵo".




## Grundakvo: Fari la nevideblan videbla


### Monda Akvo-Disvolva Raporto de UN 2022

**ISBN 978-92-3-100507-7**
**248 p., 210 × 297 mm, poŝlibro, 55 €**
**Eldonita de UNESKO nome de UN-Akvo**

Ĉi tiu raporto temas pri subtera akvo, atentigante pri ĝiaj specifaj roloj, defioj kaj ŝancoj en la kunteksto de disvolviĝo, administrado kaj regado de akvoresursoj tra la mondo.

Grundakvo – respondeca pri proksimume 99 elcentoj de la tuta likva dolĉakvo sur la Tero kaj disigita sur la tuta terglobo, kvankam malegale – havas la eblecon provizi sociojn per grandegaj sociaj, ekonomiaj kaj mediaj avantaĝoj, inkluzive de adaptiĝo al klimatŝanĝiĝo.

Tamen, malgraŭ sia grandega graveco, tiu natura rimedo ofte estas miskomprenata, kaj sekve subtaksata, misadministrata kaj eĉ mistraktata. En la kunteksto de kreskanta akvomanko en multaj partoj de la mondo, la vasta potencialo de grundakvo kaj la bezono saĝe administri ĝin ne plu povas esti preterlasitaj.




## Nekredeblaj Trezoroj

### Monda heredaĵo de UNESKO en Barato

**ISBN UNESKO 978-92-3-100440-7**
**ISBN Maping 978-93-85360-71-8**
**240 p., 254 × 305 mm, durkovrila libro, €49,90**
**Eldonejo de UNESKO/Eldonejo Maping**

En majo 2021, estis 38 Mondaj heredaĵoj de UNESKO en Barato: tridek kulturaj, sep naturaj kaj unu miksa. Ĉi tiu eldonaĵo prezentas ilin ĉiujn por la unua fojo, kun riĉaj informoj, komentoj de fakuloj kaj mirindaj fotoj.

Pluraj fakuloj en la kampoj de arkitekturo, kultura konservado, daŭrigebla heredaĵdisvolvo, faŭno kaj ekologio kontribuis al la libro, kiu prezentas heredaĵojn de prahistoriaj kavernmuroj ĝis rok-trančitaj sanktejoj kaj potencaj temploj. Ĝi ĵetas lumon sur elementojn markantajn la naskiĝon kaj disvastiĝon de budhismo kaj sur pluralisman ĉefverkon pruntitan de hinduoj. Tiu eldonaĵo ankaŭ traktas koloniepokan heredaĵon kaj kondukas nin tra la naturaj kaj miksitaj heredaĵoj de Barato, de la deklivoj de Himalajo ĝis la naturrezervejoj.

***-El la angla esperantigis Xie Ruifeng (Ĉinio)***

*publishing.promotion@unesco.org*


# Per paciga lingvo ni lernu konstrui pacigan vivon




La 21-a de septembro estas la Internacia Tago de Paco. La Universala Esperanto-Asocio (UEA) faris mesaĝon: por faciligi pacon, ni instigas, per Esperanto, interkompreniĝon kaj interkonatiĝon, kreskigante sentojn de solidaro kaj estimo inter popoloj kaj inter homoj. Per paciga lingvo ni lernu konstrui pacigan vivon.

# Multaj voĉoj, unu mondo

*UNESKO-Kuriero* aperas en la lingvoj angla, ĉina, franca, hispana, kaj ankaŭ katalune, Esperante, kaj koree.



















## Abonu la presitan version

1 jaro (4 numeroj) : 27€   2 jaroj (8 numeroj) : 54€

Afranko: 9 eŭroj (1 numero)

1 **Membro de UEA**, bonvolu pagi al nia konto ĉe UEA (celi-p)
2 **Se vi ne estas membro de UEA**, bonvolu pagi 66 svisajn frankojn jare aŭ 132 svisajn frankojn por du jaroj al jena konto:
PostFinance,   Nomo: LIU JUN,
IBAN: CH98 0900 0000 3048 76172
Post via ĝirado, bonvolu informi min ĉe lamondo@163.com

## Abonu la bitversion

**Ĝi estas 100% SENPAGA**

http://www.espero.com.cn/; http://esperanto.china.org.cn/;
https://en.unesco.org/courier/subscribe

https://en.unesco.org/courier • https://fr.unesco.org/courier
https://es.unesco.org/courier • https://ru.unesco.org/courier • https://ar.unesco.org/courier • https://zh.unesco.org/courier

unesco

Mondiacult 2022
Meksiko

# MONDIACULT 2022
# UNESKO
# MONDA KONFERENCO
## pri Kulturaj Politikoj
## kaj Daŭripova Evoluigo

**28 - 30 septembro 2022**

ISSN 2096-9082
CN 10 - 1711/C